

# BULTENO

MONATA EL DONO  
DE LA

ANTWERPEN  
PROPAGANDA



POR ESPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDER 55 TRAAAT 51

3<sup>A</sup> JARO

N<sup>O</sup> 1-2

JAN.-FEB. 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3. Bfr.  
BELGUJO : 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
EKSTERLANDO 0.15 Svfr.

## INFORMO.

Pro la granda funebro, en kiu A. P. P. K. estas, oni ne kunvenis dum januaro. La ĉiujara ĝenerala kunveno okazos la jaŭdon, la 17an de februaro 1927, je la 8a vespere, en la sidejo «Centraal Schouwburg», Van Wezenbekestraat, 10.

Pro la sama kaŭzo la «Bulteno» ne aperis dum tiu monato kaj ni nun publikigas duoblan numeron.

La Redakcio.

## ARON POSENER.

1892-1926

Tiel neatendite kaj forte kiel fulmo dum hela somertago tiel la nekompatema morto trafis nian amatan sekretarion, Sron Aron Posener kaj forrabis lin el nia rondo. Post mallonga sed rapidege plifortiginta malsano li preskaŭ subite mortis la 31an de decembro 1926 en sia 34a vivjaro.

Por la Antwerpen'a Esperanto movado la foriro de nia altŝatita samideano estas nekalkulebla, ne riparebla perdo.

Laŭ la plena kompreno de la vorto li estis

modela Esperantisto, homo kun la plej nobla idealo, vera homarano pacema. Tion li daŭre montris eĉ dum siaj ĉiutagaj okupoj.

Inter la diamantpoluristoj li rajte meritis la famon esti unu el la plej lertaj laboristoj en lia speciala fako. Ofte li lasis sian laboron kaj tiel volonte perdis tempon kaj monon por helpi malpli lertajn kamaradojn en okazo de ŝajne nevenkelblaj malfacilaĵoj.

En la fakorganiza movado li ĝuis ĝeneralan estimon.

Sro A. Posener iĝis Esperantisto en la jaro 1920. De post tiu tempo li entuziasme oferis, malgraŭ siaj korpaj suferoj, la tutan liberan tempon, kiu restis al li post lia taga laboro en la precipe por li malsaniga fabrikejo, al la Esperanto movado tute senegoiste, tute senambicie.

En 1920 li helpis al la starigo de la Antwerpen'a Grupo de Esperantistaj Diamantistoj (A. G. E. D.) kaj sekvis la unuan kurson organizitan de tiu ĉi societo.

En 1924, ĉe la fondo de la Antwerpen'a Por-esperanto Propaganda Komitato (A. P. P. K.), nomo kiun li proponis, Sro A. Posener tuj montris siajn valorajn kapablojn kaj estis unuvoĉe elektita ĝenerala sekretario de tiu ĉi nova organizajo. Li restis en tiu ĉi grava posteno kaj

plenumis sian malfacilan taskon kun modela senpartieco, akurateco kaj sindonemeco.

En la kunvenoj li montriĝis ideala membro. Avide ni ĉiam aŭskultis liajn bone pripensitajn konsilojn. En diskutoj li plene montris sian bonkoran, tolereman karakteron. Ne per akraj vortoj li provis konvinki sian obstinan kontraŭulon, sed per saĝaj, logikaj argumentoj li pacience, trankvile, tamen firme, kiel malnova filozofo, li klarigis sian vidpunkton.

S-ro A. Posener estis tute konvinkita pri la neceseco kaj utileco de la Bulteno de A. P. P. K. kaj tuj de la komenco de ĝia apero li metis sian mirindan verkokapablon je ĝia dispono kaj iĝis la ĉefa kunlaboranto al ĝia redaktado. Tre rapida kaj klara estis lia imago kaj kreopovo.

Liaj originalaj ĉefartikoloj propramove nas-



kiĝis kaj pliatigis la literaturan valoron de nia Bulteno. Ili respegulas lian senteman animon, lian serenon spiriton, lian profundan veremcon, lian nehaltigeblan celadon al la triumfo de Esperanto, al la estigode pli bona homaro. Korkuŝe estas legi lian lastan artikolon «15 Decembro 1859», verkitan malmultaj tagoj antaŭ ol la senkompata morto forprenis lian kreantan plumon el lia mano. Profunda estis la respekto por la Majstro kaj liaj lastaj pensoj ankaŭ iris al Li, nian grandan mortinton. Ĉu ne estas emociiga tiu ĉi lasta peto al la tutmonda samideanaro: «Ĉiu el ni, dum laboro aŭ promonado, tiun tagon (15an de decembro) restu senmova, nur unu minuton, pensante respektplene al tiu vivo, tiel senprofite donita por la efektiviĝo de idealo, kaj aŭdiĝas nur la korbato de tiuj homoj kiuj ankaŭ akceptis tiun idealon». La lasta deziro de nia bonkora samideano estu efektivigota!

S-ro A Posener ankaŭ estis fervora membro

de U. E. A. por kiu li nelacigeble propagandis.

S-ro A. Posener partoprenis en la 17a en Genève. Li jam preparis sin por la kongreso de Danzig kun la firma decido poste veturi al Varsava por persone saluti la Majstron, kiun li profunde admiris, ĉe lia lasta ripozejo. Sed, ho ve! lia dolĉa sonĝo ne povis efektiviĝi!

Por montri sian plenan fidon en la oficialaj kursoj organizitaj de la Antwerpen'a urbestro, li mem sekvis ilin kaj akiris la unuan lokon inter la partoprenintoj en la unua fina ekzameno, akirante la diplomon pri kapableco en la lingvo Esperanto kaj komerca korespondado kun la plej granda honoro.

En la 12aj internaciaj floraj ludoj de 1926 li partoprenis kaj lia verketo estis kronita per honora diplomo.

La novaĵo pri la neatendita tro frua fino de tia bela vivo rapide disvastiĝis tra la urbo kaj konsternis la samideanaron.

Ĉe la enterigo, la 2an de januaro 1927, delegitoj de ĉiuj grupoj aliĝintaj al A. P. P. K., la ĉefdelegito de U. E. A. kaj multnombraj gamikoj venis por lastfoje saluti la bedaŭritan samideanon.

Ĉe la tombo, S-ro J. Jacobs, prezidanto de A. P. P. K. kaj S-ro W. Swalf, anstataŭante Sron J. Swalf, prezidanto de A. G. E. D. esprimis je la nomo de siaj respektivaj organizaĵoj al la neforgesebla mortinto la sincerajn dankojn por liaj neniam forgeseblaj servoj.

La Antwerpen'a samideanaro perdis en la persono de S-ro A. Posener grandaniman Esperantiston. Lia laboro finiĝis, sed ĝi daŭre restos por ni imitinda ekzemplo. Lia memoro restos por ĉiam profunde gravurita en ĉies koroj! Li ripozu en paco kaj ĝuu la eternan dormon de la ĝustuloj!

Al la funebranta familio A. P. P. K. petas akcepti la certigon pri sia sincera kunsento en la grava funebro.

A. P. P. K.

Dimanĉon, la 27an februaro okazos la malkovro de memortabulo de la Esperantistoj sur la tombo de nia bedaŭrante samideano, S-ro Aron Posener, en Putte (Nederlando).

La gesamideanoj kiuj partoprenos en la solenajo devas esti en la vilaĝo je la 1 3/4 h.

Oni povas kunveturi per speciala aŭtobuso (informoj ĉe S-ro J. Swalf, August Sniedersstr., 51). Estas ankaŭ ordinara aŭtobuso inter Antwerpen (centra stacidomo) kaj Putte.

Por la biciklistoj ni sciigas ke distanco Antwerpen - Putte estas 17 km. Ne estas malfacilaj ĉe la landlimo se oni havas kun si la identitekarton kaj la kvitancon de la biciklotakso. Biciklistoj kunvenas je la fervoja ponto (Schijnpoort) je la 12a

Oni ankaŭ povas veturi per vagonaro ĝis Cappellen kaj piediri ĝis Putte (distanco 7 km.)

## LA FREMDLINGVA BALASTO EN LA MEZLERNOJ KAJ ESPERANTO.

Ĉar unu el niaj plej gravaj celoj estas la enkonduko de la deviga instruado de Esperanto en la lernejoj, mi pro tio opinias, ke ni fine devas pli intense labori al tiu celo ol ĝis nun. Ni miaopinie pli frue atingos tiun enkondukon en la mezlernejoj ol en la elementaj lernejoj, ĉar jam nun fremdaj lingvoj estas instruataj en la mezlernejoj ĉiulandaj. En elementaj lernejoj oni instruas fremdajn lingvojn nur en landoj (plej ofte malgrandaj) kun kelkaj nacioj. La granda plimulto de tiuj lernejoj sur la tero uzas nur unu lingvon, la enlandan nacian. Pro tio ni celu unue al la pli proksima, kaj speciale al la vidpunkto ne nova, skizita per la sekvantaj rimarkoj. (Mi priskribos la situacion en Ĉeĥoslovakio).

Tie ĉi la mezlerneja instruplano postulas meznombro 8 ĝis 12 horojn semajne por fremdlingvoj, nome la latina, greka, franca aŭ angla. Tamen 90 % de la mezlernejoj ne bezonas ilin en siaj postaj profesioj. La anglan kaj francan lingvojn eĉ ne 5 % de la abiturientoj ellernis tiom, ke ili povus korekte uzi ilin en interrilatoj kun la korespondaj nacioj, nek buŝe nek skribe. (Ĉiu mem povos konvinkiĝi pri tio, se li invitos iun abiturionton, ke li korekte traduku iun simplan literaturaron en la lingvon, kiun li lernis 7 ĝis 8 jarojn.) La greka lingvo havas por la mezlernejoj la saman valoron kiel la hebrea aŭ sanskrita.

Kiom bezonas la pastroj, juristoj, medicinistoj, natursciencistoj ktp. el la latino? Efektive nur eretojn, kiujn ili povus lerni dum du jaroj, ĉar ili estas jam aŭ tute malmodernaj, aŭ tradukitaj.

Kia tempomalsparo!

Se ni kalkulas 10 horojn semajne por tiuj fremdlingvoj, jen sumiĝas: por monato 40 horojn, por 10 lernmonatoj 400 h., por 8 lernjaroj 3200 h., kaj ĉar ĉiu instruoro minimume postulas unu horon da prepara hejmlaboro, do pliajn 3200 h., tutsime 6400 horojn... sekve preskaŭ ĉiu abituriento estis devigata malŝpari proksimume 5000 ĝis 6000 horojn, dum sia mezlerneja tempo, kaj dediĉi ilin al por li ne nur senutila sed eĉ malutila laboro, ĉar li per tiom da peno, kaj nervostreĉado, vane konsumis, misuzis sian cerbon kaj malzorgis sian tiel necesan korpan edukon.

Oni scias kaj plendas ĉiam, ke la mezlernejoj estas troŝargitaj per lernmaterialo, kadukiĝas spirite kaj korpe sub la tropezo de la

lernpostuloj; oni scias, ke la reformo de la mezlerneja instru plano estas tre necesa, sed la aŭtoritatuloj ne volas, kaj la gepatroj ne kuraĝas postuli aliĝon.

Pro tio estas necese, ke ni esperantistoj grandstile atentigu, kuraĝigu, organizu tiurilate la gepatraron: Oni postulu, ke fremdajn lingvojn lernu nur tiu, kiu havas talenton por ili kaj kiu ilin bezonas. Sed ĉiu lernu unue la facillerneblan Esperanton, ĉar ĝin povas lerni ĉiu tiel bone dum dekofoje pli mallonga tempo ol iun fremdan nacilingvon, ke li efektive povos paroli kaj korespondi kun ĉiuj alinaciaj esperantistoj. Aliparte, kaj tio estas tre grava, la ellerno de Esperanto estas tre bona preparo por la lernado de fremdaj lingvoj, kiujn oni ja laŭ bezono kaj talento lernos ĉiam!

Tial ĉiu postulu, ke la naciaj fremdaj lingvoj estu instruataj nur nedevige.

Kelkaj homoj asertas, ke per la instruado de la latina kaj greka lingvoj estas akriĝata la spirito. Nu, tiu aserto estas nur malsaĝa frazo, ĉar mallogikaj, kiaj estas tiuj lingvoj kun siaj centoj da kontraŭregulaĵoj neniam povas vere akriĝi la spiriton. Por tio estas pli taŭga la logika matematiko, pli taŭga ol mortaj lingvoj.

La tempon, kiun oni ŝparas per la eligo de la fremdaj nacilingvoj, la mezlernejoj povos uzi duone por instruado de multaj por la vivo pli necesaj scioj (financaj, bankaj, socialekonomiaj ktp.), kaj duone por la korpa plifortigo de la gejunularo.

Jen mi opinias, ke estas necesege, ke ni esperantistoj en ĉiuj landoj tiuj publikigu nacilingve en kiel eble plej multaj naciaj kaj fakaj gazetoj tiurilatajn artikolojn kaj organizu amasan kolektadon de subskriboj en subskriblistoj, speciale de estontaj gepatroj de mezlernejoj, sed ankaŭ de aliaj homoj, por ke oni povu ensendi tiujn subskribojn kun rilatantaj petroskriboj por reformo al la landaj ministrioj de la instrua aferoj.

Mi bone scias, ke multaj reakciuloj kaj malprogresuloj kontraŭas al tiuj niaj penoj, sed ni ne timu ilin, ĉar ni batalos por bono de la popolo, kaj estos tre grave, speciale pri tiu nia bona intenco konvinki la popolon, por ke ĝi pli voionte konsentu al niaj proponoj.

Modiaŭ ĉiu atentis pri tio, ke li ne investu en entreprenon tro multe da kapitalo aŭ laboro, nur nia publika instruado ne.

Cetere, la progreso de la nuntempa kulturo estas kaj estos precipe en la natursciencoj. Per fremdlingvoj neniu povos inventi ion.

Ludoviko Krysta, en Ĉeĥ. Teschen 2, Silezio, Ĉeĥoslovakio.

—el Heroldo de Esperanto.

**PROVO DE TEKNIKA INSTRUADO  
PER ESPERANTO.**

L'Ecole spéciale des Travaux publics, du Bâtiment et de l'Industrie (Speciala Lernejo por Inĝenierarto, domkonstruado kaj Industrio) en Paris, kiu posedas la plej kompletan kaj plej gravan organizadon en Franclando por teknika instruado perkoresponda, estas preta disvastigi eksterlanden tiun instruadon, por la profito de ĉiulandaj Esperantistaj teknikistoj kaj inĝenierlernantoj. Por komenci tian agadon, ĝi komisiis areton da kompetentaj Esperantistoj por traduki ĝian tutmonde konatan kaj ŝatatan kurson pri **Armbetono**, kun ekzercoj kaj korektaĵoj.

Bonvolu ĉiu interesato doni per simpla poŝtkarto sian nuran aprobon; tiu aproba avizo trudos al ili nenian devigon. Ili post nelonge ricevos pliajn necesajn detalajn informojn.

Ni varme konsilas al niaj amikoj fari ĉion eblan por sukcesigi tiun praktikan aplikon de Esperanto, ĉar ĝi liveros potencon argumenton por la disvolviĝo de nia lingvo en la Teknikaj kaj Sciencaj rondoĵoj... Multaj skribu!!! Jen la adreso:

Sro Direktoro de l'Ecole spéciale des Travaux publics, 3, rue Thénard, Paris, V.

**OFICIALA PROTEKTO DE  
ESPERANTO EN ANGLUJO.**

La Angla Ministro de l'Publika Instruado konsentis, kiel en la antaŭaj jaroj, pri subvencio al la kursoj de Esperanto, kiuj figuras en la vespera kursaro por plenaĝuloj de l'diversaj urboj. Tiuj kursoj estas submetitaj al la regularo kaj la inspektado oficiala. En Londono sole nuntempe okazas 15 kursoj sub aŭspicioj de l'London County Council kaj de la Asocio por Laborista Edukado.

I. E. S.

**OFICIALAJ ESPERANTO-EKZAMENOJ.**

Por la 3a fojo oficialaj ekzamenoj de Esperanto okazis en Vieno la 10 novembro. Dek tri kandidatoj, inter ili 12 instruistoj kaj unu eksterlandano, pasis la ekzamenon pri instruado kun distingo. Kvar personoj faris la ekzamenon pri kapableco kun plena sukceso.

En Londono okazos la Esperanto-ekzamenoj de la Komerca Ĉambro de Londono.

I. E. S.

**ESPERANTO EN LA KOMERCA  
INSTRUADO.**

La Komerca Lernejo «Merkuro» de Zagreb (Sudslavio) enkondukis Esperanton kiel devi-

gan fakon en sian instruadon programon de 1926-27.

I. E. S.

**ESPERANTO ĈE LA UNIVERSITATO.**

Oni jam menciis, ke la Universitato de Zagreb kreis katedron por Esperanto en sia komerca fakultato.

Sub la patronado oficiala de la Komerca Ĉambro la Universitato de Valencia (Hispanujo) starigis Esperanto-kurson en sia programo de fremdlingvoj.

I. E. S.

**ESPERANTO EN LA SERVO  
DE L' PUBLIKO.**

Du delegitoj de l'Fervojararo de Finlando ĵus faris vojaĝon tra Eŭropo por studi la specialkondiĉojn de l'trafiko en la diversaj landoj. Ili vizitis 25 urbojn kaj 15 ŝtatojn kaj traveturis distancon de preskaŭ 10000 km. La sola fremda lingvo, kiun ili uzis, estis Esperanto, kiu ŝuficiis al ili ĉie.

I. E. S.

**LA UNIO DE INTERNACIAJ ASOCIOJ  
KAJ ESPERANTO.**

La intereso de la Unio de Internaciaj Asocioj en Bruselo por Esperanto montras diversajn eblecojn de l'aplikado de tiu ĉi lingvo en la internacia sfero.

1) La Unio uzas Esperanton kiel lingvon de korespondado kaj en siaj kongresoj.

2) Ĝia Monda Muzeo enhavas salonon de Esperanto.

3) Ĝia repertuaro universala de bibliografio enhavas sektion de Esperanto.

4) Esperanto figuras, kun speciala divizio, en la decimala klasifiko.

5) Mallonga manlibro de l' decimala klasifiko aperis en tiu ĉi lingvo. Eldono poliglota kun Esperanto estas en preparo.

6) En la internacia Bibliografio, sekcio Esperantista estas kreita.

7) Ĝia dokumenta enciklopedio enhavas grandan nombron da aktoj rilate al tiu ĉi lingvo.

8) En la Muzeo de l'Gazetaro, kiu enhavas pli ol 80.000 specimenojn de diversaj ĵurnaloj, Esperanto estas reprezentita.

La uzo de Esperanto estas ankoraŭ antaŭvilita per aliaj sekcioj de la Unio.

I. E. S.

**KONKURSO DE ESPERANTA  
STENOGRAFO.**

Por la tria fojo «Fluganta Skribilo», gazeto kiu propagandas la esperantan stenografion, or-

ganizas inter siaj gelogantoj konkurson, kiu enhavas 6 sekciojn: Stenograf-belskribarto, Metagrafa belskribarto, Flua stenografado, Kartografio, Stenografiaj artaĵoj, Malgrandega stenografskribo.

Por tiu konkurso multnombraj premioj estas donacotaj: Arĝentaj kaj bronzaĵoj medaloj, Atestoj, Libroj, Abonoj al esperantaj kaj stenografaj gazetoj, k. t. p.

La regularo de tiu konkurso — kun multaj modeloj la stenografaj desegnaĵoj — estos sendata senpage al ĉiu persono, kiu uzas, lernas aŭ deziras lerni la esperantan stenografon, kaj petos ĝin de S-ro P. Flageul, 9, Bulvarde Voltaire, Issy, Seine, Francujo.

### PAROLADO PRI ESPERANTO.

Jaŭdon, la 10an de februaro, S-ro J. Jacobs, prezidanto de A. P. P. K., faros anglalingve propagandan paroladon por la Antwerpen'a societo de anglaj virinoj Girls Friendly Society, en la sidejo, 15, Leopoldstraat. Estas la estraro de la nomita societo kiu mem petis tiun paroladon, tiel montrante sian intereson por nia movado.

### LIER.

La 28an de novembro ĉirkaŭ 15 gefervoruloj de Antwerpen akompanis al Lier S-ron J. Jacobs, prez. de A. P. P. K., kiu tie estis faronta publikan paroladon kun lumbildoj pri Finnlando. La paroladon organizis la esperantista grupa «Liera' Stelo» por profiti de la okazo por propagandi Esperanton inter la aŭskultantaro kaj sukcesigi novan kurson organizotan.

Je la 2.30 p. m. oni forveturis el Oude-God per luksa, komforta aŭtobuso. Alveninte en Lier ni tuj iris al la kafejo «Belle Vue», kie la ĉiam vigla samideano, S-ro J. Leflot, prezidanto de «Lier'a Stelo» deziris je la nomo de la lokaj esperantistoj bonvenon al la Antwerpen'oj.

Post amika interkonatiĝo oni iris por trarigardi la interesegan urbon, kies antevaj anguloj ĉiam ravas la vizitanton.

Je la 5a la Antwerpen'aj gesamideanoj reiris al la «Belle Vue» por tie kune trinki kafon kun bongustaj Lier'aj kukaĵoj.

Post tio oni aranĝis la lumbildaparaton, fiksis la blankan tukon kaj aranĝis la ekspoziciejon de Finnaj manlaboraĵoj.

Baldaŭ multnombra aŭdantaro plenigis la ĉambregon. Per sia kutima agrabia talento de parolanto, S-ro Jacobs parolis pri la historio, la geografio kaj la loĝantaro de la malmulte konata Finnlando, kiun li dufoje jam vizitis. Poste li farigis al ni per la imago vojaĝon tra la mirinda lando de «mil lagoj» kaj per bela

serio da lumbildoj, en kiu lerte helpis nia juna samideano S-ro K. Jacobs (filo), li montris al ni ĝiajn ĉefajn vidindaĵojn.

Dum du horoj S-ro Jacobs sukcesis teni la atenton de la aŭdantaro kiu per varmaj aplaŭdoj dankis lin kaj nur bedaŭris ke la interesaga parolado finiĝis.

Post tio oni donis al la ĉeestantojn la okazon detale rigardi la ekspoziciajn artaĵojn.

Pro la propagando por Esperanto kiun S-ro Jacobs lerte miksis en sia parolado jam kelkaj personoj tuj enskibiĝis por la nova kurso kiu komenciĝis la 5an de decembro en la mezgrada lernejo. Apartan dankon oni ŝuldas al S-ro pastro Orädd, direktoro de la Finna marista misio en Antwerpen, kiu afable metis je la dispono la bonegan lumbildaparaton kaj vidajkartojn.

R. S.

### RAPORTO PRI LA JARKUNVENO DE «LA REKTA VOJO».

1926.

Karaj Gesamideanoj,

La unuan fojon en nia grupo okazas ĝenerala jarkunveno. Kvankam juna, nia rondo donis pruvojn de vigla vivado, kiel elmontriĝis el ĉi tiu roporto.

Mi petas vian atenton por ke vi juĝu pri nia laboro; por ke vi, per viaj konsiloj, montru al la elektota estraro la plej bonan manieron sekvi la rektan vojon!

::: ::: :::

#### I. — Starigo de la grupo.

La 21an de novembro starigis «La R. V.» kun la celo:

1) propagandi por la disvastigo de E. kaj ĝia enkonduko en la oficialan instruadon.

2) Aligi la novan grupon al A. P. P. K.

3) Aligi al B. L. E.

Aniĝis tuj 22 personoj.

La estraro elektata por 1926a:

Prez.: S-ro J. Karnas.

Vic-prez.: S-ro J. De Waegenaere.

1a Sekr.: F-ino B. Geers.

2a Sekr.: F-ino L. Keverijn.

Kasisto: S-ro A. Lodema.

::: ::: :::

#### II. Membroj.

Dum la jaro 1926 a nia membraro plinombrigiĝis ĝis 54. En la monato septembro la morto rabis al ni nian junan samideaninon. F-inon Agnès Bastiaens, kiu kvankam nove esperantigita, jam estis tre fervora samideanino.

::: ::: :::

#### III. — Nia laboro.

Ni devas ĝin konsideri laŭ tri vidpunktoj, elfluantoj el niaj statutoj mem:

a) Rilate A. P. P. K.

b) Rilate la internan, amikan vivadon en R. V.

c) Rilate la B. L. E.

#### A. — Nia laboro rilate A. P. P. K.

La 12an de decembro 1925a ni estis informataj pri nia akcepto en A. P. P. K.

Delegitoj de la R. V. estis nomataj S-roj De Waegenaere, Lodema, Van der Mast, kaj F-ino Geers, anstataŭanta.

Regule ni interrilatis kun la estraro de A. P. P. K., kiu senlace daŭrigis la propagandan laboron.

Mi ne povas preterlasi peti de vi ke vi honoru kaj rememoru nian modelan samideanon, S-ron A. Posener, kiu vere estis la animo de A. P. P. K.; en kiu ni ne nur perdas neanstataŭeblan kunlaboranton, sed honestan gvidanton, Esperantiston laŭ la interna ideo de nia majstro Zamenhof!

R. V. havis la ĝojon apogi A. P. P. K. en ĝia propagando per donaco de cent frankoj.

Ni helpis al la internacia laborado, sendante al S-ro Dietterle kiel eble plej precizajn informojn pri la esperantistaro en Antwerpen, por la statistiko, kiun li publikigos dum la venonta jaro jubilea (1887a - 1927a).

#### B. Interna vivo de la R. V.

1) **Kunvenoj:** Regule okazis niaj kunvenoj en «Hôtel Cecil» ĉiusabate. Al diskutadoj pri okazintaĵoj ĉiam partoprenis ĉiuj la ĉeestantaj membroj. Krom tio la anoj amuris sin per kantoj, sociaj ludoj, antaŭlegadoj.

Multaj fremdlandaj, samideanoj venis ĉe ni: Poloj, Rumano, Hungaroj, Francano, Aŭstria-ano, Angloj, Nederlandanoj, Ruso, Svedo. Estoj.

#### 2) Paroladoj.

Kelkaj interesaj paroladoj meritas specialan mencion.

Pri la funkciado de la pilotservo: S-ro Lodema.

Pri la bredado de kokinoj: S-ro Jacobs.

Du pri Finnlando (kun lumbildoj): S-ro Jacobs.

Kie Rubens naskiĝis: S-ro De Waegenaere.

Pri la kancero (kun lumbildoj): S-ro Karnas.

Pri la koaksfornoj: S-ro Foquet.

Pri diversaj humoplenaj temoj: S-ro Fr. Roelants.

#### 3. Muzikvesperoj.

Specialan dankon ni ŝuldas al S-roj Ariën kaj J. Jacobs, kiuj bonvole gvidis niajn muzikvesperojn.

#### 4. Baloj.

Ĝis nun la R. V. organizis kvar balojn unue por amuzi la membrojn; due por pliriĉigi nian kason, kies enhavo estas fonto por daŭrigota propagando.

#### 5. Donacoj.

Krom por propagando ni kelkfoje ĉerpis el nia kaso por oferi donacojn, el kiuj mi volas menci la 96.35 fr. por la viktimoj de la subakvigo en decembro 1925a pere de «De Schelde».

#### 6. Abono al revuo.

La grupo povis permesi al si abonon al »Literatura Mondo« de kiu ni ricevis tri numerojn, kaj antaŭ tri monatoj la promeson pri pliaj sendaĵoj!

#### 7. Ornamajoj.

La grupo elspezis sumon por aĉeti flagetojn, per kiuj S-ro Libot, ĉiam sindona, ornamas la ejojn, kie sin amuzas la R. V. anoj: danckolon, festensalonon, boaton!

#### 8. Festeno.

La 20an de novembro okazis festeno por memorigi la fondiĝon de la grupo. La 41 ĉeestintoj povas certe atesti pri la amika spirito, kiu regas en R. V.

#### 9. Ekskursoj.

Estas malfacile disigi la ekskursojn kiujn organizis la R. V. de tiuj de A. P. P. K.

Ni vizitis Hemixem, kie nin gastigis G-oj Keverijn; ni vidis faman kokinbredejon en Konings-Hoyekt. Ni pasigis agrablajn tagojn en Mehleno kaj Liero kun la tieaj E. Ni promenis en Peerdschbosch, ekskursis al St-Mariaburg kaj Kessel, kaj ni ne forgesu menci la sukcesplenan boatveturadon al Vlissingen en Julio! gviditan de S-ro Lodema, la plej kompetenta el ni en tiaj vojaĝoj.

Krome la grupo vizitis la Muzeon de Bel-Artoj kondukata de S-ro la konservisto; — kaj

#### 10. Ŝparkonto.

ankaŭ ni iris al la Muzeo Spitzner.

S-ro Lodema malfermis ŝparkonton, dank'al kiu multaj el ni partoprenis al festaj okazintaĵoj kun la dolĉa iluzio ke tiuj estas senpagaj!

#### C) Nia laboro rilate al B. L. E.

Povas ŝajni strange al tiuj samideanoj, kiuj ne de la komenco aliĝis al R. V. ke malgraŭ la intenco de la grupo aliĝi al B. L., tio ĝis nun ne okazis:

La 28an de novembro 1926a ni informis B. L. pri la fondiĝo de R. V. kaj petis pri la regularo de tiu asocio, por ke ni ekkonu la kondiĉojn je kiuj nova grupo povas aliĝi.

La 1an de decembro la sekretario de B. L. sendis la regularon. La 22an de decembro la sekretario de la B. L. atestas pri tia peto de ni (skribita la 12an de decembro) kaj informas nin ke nun la komitata kunveno de B. L. ĝi estos prezentata.

La 6an de Marto la prez. de R. V. komparis la statuton de B. L. senditan de la sekretario kun alia, presita post la nia peto por aliĝo, en

B. E. Se la dua estas sekvota ni ne povas aliĝi, ĉar laŭ ĝi abono al B. E. estas deviga por ĉiu membro aparte. Pro tio la estraro sendis leteron al la ligestraro, la 26an de marto, por repreni sian peton por aliĝo.

Tie finis niaj interilatoj kun B. L.

:-: :-: :-:

Por fini mi petas senkulpigon de tiuj gesamideoj kiuj je iu aĉ alia akazo oferis al ni sian helpon kaj kiujn mi ne menciis. Al ili ĉiuj mian sinceran dankon!

La prezidanto,  
J. KARNAS.

La sekretario,  
B. GEERS.

## KONGRESO DE INTERNACIA "ROTARY CLUB" OJ.

Kongreso de Internacia ROTARY-CLUBS, grava asocio, kiu entenas 110.000 membrojn en 32 landoj, okazos en Ostende (Belg.) je la 5a de Junio 1927. Jam kelkaj samideoj, membroj de tiu Asocio, propagandis pri Esperanto en siaj kluboj kaj sukcesis interesigi ilin pri nia lingvo, ĉar la idealo de la Rotary'anoj multe similas Esperantismon.

Por utiligi tiujn unuajn sukcesojn kaj ebligi efikan agadon en la Kongreso suprealudita, estas necese, ke la Rotary'aj Esperantistoj antaŭe interkonsiliĝu. Tiu-ĉe ili do estas petataj konigi kiel eble plej baldaŭ siajn nomon kaj adreson al S-ro Rollet de l' Isle, 35, Rue du Sommerard, Paris. V. Franclando.

## Novaj Radio-disaŭdigoj de Esperanto.

Nova kurso komenciĝis de la stacio de Ekaterioslav (Siberio) la 30 novembro.

La stacio de Krasnodar dissendas raporojn en Esperanto ĉiumerkrede. Pardoj estas avizitaj de l'stacioj de Dublino (Irlando) kaj Cleveland (Ohio U.S.A.), kie kurso ĵus finiĝis, la 15 decembro, la stacio de Brelaŭ (Germanlando) disaŭdigis programon tute en Esperanto. La amatora posteno 8rv en Orly (Seine) dissendas en tiu ĉi lingvo. La Radio-direkcio de Praha, kiu antaŭe rifuzis enkonduki Esperanton, konsentis, ke kurso de tiu ĉi lingvo estu disaŭdigata de sia stacio en Brno.

I.E.S.

## Esperanto en la internaciaj Kongresoj.

La la Internacia Kongreso de la Federacio de l' Societoj Antialkoholaj de l'Oficistaro de Fervojoj en Parizo unuanime alprenis la sekvantan rezolucion en sia kunveno de 25 oktobro :

La kongreso, konvinkite, la interkompreno estas de granda graveco en internacia kongreso.

konscia pri la malfacilaĵoj, kiujn renkontas la societoj en certaj landoj por trovi en sia rondo delegitojn, kiuj scias la lingvojn, kutime uzitajn en la kongresoj,

rekonas, ke komuna helplingvo prezentus la plej grandan utilecon kaj esprimas la deziron, ke la sekretariejo preparu por la proksima kongreso raporton pri la rezultatoj, atingitaj en tiu ĉi kampo.

La delegito de l' Finlandaj fervojistoj en tiu kongreso ne povis uzi alian fremdlingvon ol Esperanton.

I.E.S.

## LA SEKRETO DE KARLO VAN DE BEEK.

(daŭrigo)

« Se vi volas resaniĝi, mi diris al la fraŭlino, «vi obeu min, ne atentante la kialon de miaj ordonoj. Unue mi deziras ke vi aĉetu tion kion vi bezonas por la tagmanĝoj; poste helpu la servistino en sia laboro ĉu en la kuirejo ĉu en la domo. Kiam vi estas laca, promenadu. Morgaŭ vi faros la saman laboron kiel hodiaŭ kaj mi diros al vi kion vi faros postmorgaŭ».

La sekvantan tagon mi petis de la patro Marien: «Ĉu vi estas kontenta pri la laboro de via filino?» «Jes» estis la respondo. «Ĉu vi permesas ke ŝi akompanu min en la loĝejoj de la malriĉaj personoj?» mi demandis.

Post jesa respondo, kaj kelkaj minutoj, ni promenadis tra la urbo.

Ni vizitis la malgrandajn, mallumajn domojn. La juna fraŭlino, kiu akompanis min tuj interesis sin pri la infanoj; ŝi ilin prenis sur siajn genuajn, lavis la malpurajn kaj interparolis kun ilia patrino. La tempo forflugis kaj kiam ni revenis al la hejmo de fraŭlino Marien niaj monujoj estis malplenaj.

La sekvantan tagon estis dimanĉo. — Posttagmeze ni faris belan ekskurson sur la kanalo de Louvain (9) ĝis la vilaĝo de Hever (10). Post duonhora promenado tra kampara aleo bordita per diversspecaj arboj ni alvenis al artefarita lageto kie oni banis. Ni forprenis niajn ŝuojn kaj ĝoje plaŭdetis en la akvo. Ni baldaŭ malsatante revenis al la domo apud la kanalo. Tie ni trinkis kafon kaj manĝis «cramique» (11). Kiam la suno jam subiĝis, ni revenis per la vaporsipeto, kontentaj pri nia tago.

Mi jam dum tiu feliĉa posttagmezo diris al fraŭlino Marien la laborojn kiujn ŝi faros la morgaŭan tagon.

Tiel iom post iom mi pli bone konatiĝis kun Denisino Marien kiu post kelka tempo ne plu estis malsana. Fine mi edziĝis, kun mia flegitino ĉar amo grandiĝis inter ni.

Kaj nun, karaj legantoj mi eksciis la sekreton de Karlo Van de Beek. Mi tion diros al vi: «Denisino Marien, mia edzino, estas vera trezoro».

Salvatoro.

::: ::: :::

(9) Louvain. — Vidu (2). Flandre: Leuven. Universitato mondkonata.

(10) Hever. — Sola nomo de tiu vilaĝo. — Elparolu: Hevr.

(11) Cramique. — Speciala, kun sekigitaj vinberoj preparati pano.

### LA REKTA VOJO.

Sabaton, la 19an de februaro 1927, je la 8a vespere, en la salono Van Wezenbeke, Van Wezenbekestraat, maskita kaj nemaskita balo. — Rekta Vojo Valso. — Premioj. — Surprizoj. — Jass-Band.

Ĉiuj gesamideanoj estas invitataj. Prenu viajn kartojn antaŭe: prezo 2 fr. La vesperon de la balo la enirprezo estas 3 fr.

### ILUSTRITAJ POSTKARTOJ.

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn ilustritaj poŝtkartojn, eldonitajn de A. P. P. K. (kolekto Nels).

Aperis 2 malsamaj serioj da 10 kartoj.

Prezo po serio: 1 Bfr.

Haveblaj: A. P. P. K., Groote Beerstraat, Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva: flandra, Esperanta, franca; do ankaŭ uzeblaj de neesperantistoj.

### PRAKTIKA LERNOLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernolibron ilustriton: Cours pratique d'Espéranto, eldonita de Librairie centrale Esperantiste, Paris, kun antaŭparolado de Sro Th. Cart. — 192 paĝoj. — Prezo: 6 Fr.fr. krom sendkostoj.

Deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotterdamstraat, 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

### Kie renkontiĝas la Antverpen'aj Esperantistoj?

A.P.P.K.. Jaŭde, je la 8a vespere, en Centraal Schouwburg, Van Wesenbekestraat, 10.

Antverpena Grupo de Esperantistoj Diamantistoj. La lan mardon de ĉiu monato, je la 8a vespere, 66-68, Plantijnlei.

Antverpenaj Geinstruistoj Esperantistoj. Vidu A. P. P. K.

Antverpena Polica Grupo Esperantista. En la policernejo, Gildekamerstr., 9.

La Rekta Vojo. Sabate, je la 8a vespere, en Hôtel Cecil, Van Arteveldestr., 8.

Nia Ideo. Ĉiu merkredo je la 8.30 vespere, en Volksgebouw, Meir.

Suda Lumo. Vidu A. P. P. K.

### RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto. — Usono. — Arguso. Mexico D. F. — Brazila Esperantisto. Rio de Janeiro. — Bulgara Esperantisto, Sofio. — De Wereldtaal. Eemnes. — Hollanda Esperantisto. Amsterdam. — Hungara Esperantisto. Budapest VI. — International Language. London W. C. I. — Internaciaj Informoj. Amsterdam. — Kolektanto. Eemnes. — L'Araldo Esperantisto. Italujo. — Le Semisto. Hispanujo. — Libero. Bulgarlando. — Liberpensulo. Leipzig. — L'P. T. T. Paris XVIII. — Litovia Stelo. Kaŭnas. — Nova Tago. Germanujo. — Norvega Arbeiter Esperantisten. Oslo. — Ora Epoko. Svislando. — Revuo Orienta. Tokio. — Svenska Arbetar Esperanten. Goteborg. — Svenska Esperantisten Tidningen. Stockholm I. — Vegeterano. Hamburg. — Wolnowyliciel. Pollando.



# BULTENO

MONATA ELDONO  
DE LA

ANTVERPEN  
PROPAGANDA  
E  
ESPESPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDERSTRAAT 51

3<sup>a</sup> JARO

N<sup>o</sup> 3

MARTO 1927

JARA ABONO

BELGUJO : 3.— Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.

UNU NUMERO

0.30 Bfr.

0.15 Svfr.

## LA PROBLEMO PRI LA FORLASANTOJ.

La problemo pri la forlasantoj estas tiel malnova kiel la historio, ĉar la forlasa instinkto estas unu el la difektoj de la homa karaktero. Tuj senesperigis obstrukcis la vojon de ĉiu granda movado de post la ekapero de la kulturo. Achilles revis en sia tendo, kaj la Trojanoj superis dum keika tempo. Cleopatra retiris sian ŝiparon en Actium, kaj Octavius venkis Marcus Antonius. Richard II disputis pri la entrepreno, kaj la regardo de Plantagenetidoj finiĝis. Colombus malkovris teron ĝustatempe por malhelpi ke lia forlasanta ŝipanaro turnu al li la dorson. Eĉ Moses devis subteni siajn armilojn en la batalo kun la Amalekitoj. En la parabolo de la semanto Jezuo Kristo parolas pri la semoj kiu «falas sur ŝtonajn lokojn, kie ili ne havis multan grundon; kaj ili subite leviĝis, ĉar ili ne havis profundan grundon; kaj ili subite leviĝis, ĉar ili ne havis profundan grundon; kaj kiam estis leviĝintaj, ili estis bruletataj; kaj tial ke ili ne havis radikojn, ili forvelkis.

Je la komenco ni devas memori ke difektoj de niaj vicoj povas **prokrasti** sed ne povas pro la karaktero de la afero malhelpi la finan plenan starigon de internacia helplingvo. En sia nemortema artikolo nia Majstro, je momento kiam la movado ne estis atinginta la dekonon de la nantempaj proporcioj, proklamis sian fidon kaj denas pro tio siajn motivojn en la sekvantaj vortoj.

« Nia atero iras malrapide kaj malfacile; tre povas esti, ke la plimulto de ni ne ĝisvivos tiun momenton, kiam montriĝos la fruktoj de nia agado kaj ĝis la morto mem ni estos objekto de moko; sed ni iros en la tombon kun la konscio, ke nia afero ne mortos, ke ĝi morti neniam povas, ke pli aŭ malpli frue ĝi devas atingi la celon. Kaj se eĉ, lacaj de la sendanka laborado, ni kun malespero kaj apatio lasus fali la manojn, — tute egale, la afero ne mortos; anstataŭ la lacigitaj batalantoj aperos novaj; ĉar ni denove ripetos, ke se estas eksterdubo, ke lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon kaj se ĝi estas atingebla, en tia okazo por nenia homo ne blindigita de rutino ne povas esti ia dubo, ke ĝi pli aŭ malpli frue nepre estos atingita, kaj nia konstanta laborado estos por la homaro eterna memorigado tiel longe, ĝis la ideo de lingvo internacia estos efektivigita. » (1)

En la Esperanto movado estas tri tipoj de forlasantoj. Unue estas la idealisto kiu vidis en Esperanto la komencon de nova epoko, kaj ĉar la tago ne alvenas tiel rapide kaj brile kiel li deziras, reenvolviĝas en sia kovrilo kaj daŭrigas la revadon. Tia persono malofte lernas la lingvon ĝis ia amplekso. Li aŭ ŝi estas malofte pro tio vera Esperantisto, laŭ la oficiala difino kiun ni tuj mencios. Estas tiu ĉi klaso kiu en societaj flugenoj multe parolas pri planoj por verda tago sur ĉiu lernejo, Esperanto-pa-

(1) Fundamenta Krestomatio p. 284.

rolantaj klaŭnoj en ĉiu circo, kaj Esperantaj nomoj por Pulman dormvagonoj. Ĉar iliaj proponoj ne estas favore akceptataj kaj ĉar ili ne estas lokataj je la kapo de la propaganda komitato, ili malkontentiĝas pri la movado kaj ili estas for.

Alia klaso interesiĝas pri Esperanto kiel lingvo ĉefe, kaj tial lernas ĝin sufiĉe ĝisfunde. La ensorĉo de la internacia lingvo estas por ili de la sama speco de konstrua ludilo aŭ de dispecigebla motorboato. Tiu ĉi klaso pensas malmulte aŭ tute ne pri la praktikaj aplikadoj de internacia lingvo. Ili malmulte scias kaj estimas pli malmulte la nuntempan disvastiĝan de la lingvo, nek ili interesiĝas por kunhelpi en la laboro de la plua disvastiĝo de la lingvo. Ili emas la lingvan perfektigon kiel rimedon de intelekta plezuro. Komprenoble, ĉar Esperanto ne estis kreita kun tia celo, pli malpli frue ili elreviĝis. Aŭ ili tute forlasas la subjekton kaj komencas ian novan ludon, aŭ se ne ili aliĝas al unu aŭ aliaj apartaj grupoj de teoriistoj kiuj estas perfektigantaj (?) tiun ĉi aŭ tiun dialekton de Esperanto laŭ siaj propraj personoj principoj ne konsultante la grandan anaron de la praktikaj uzantoj de la internacia lingvo.

Ni observu ke tiu ĉi klaso ankaŭ, eĉ kvankam ili posedas uzebalan scion de Esperanto, ne estas veraj Esperantistoj laŭ la oficiala difino kiun ni tuj mencias.

Por tio kio koncernas la du tipojn de forlasantoj, kiujn ni ĵus priskribis la «persistuloj kaj la diletantoj ni sentas ke, se ili ne aliĝas, ju pli baldaŭ ili forlasas niajn vicojn des pli bone tio estas por nia granda afero. Ilia aliĝo al ni estis kaŭzita precipe de la malbonaj metodoj propagandaj trograndigo de la ideala flanko de la movado kaj de la preĵekteco de Esperanto kiel lingvo.

Per la kreskanta influo de la praktika metodoj en nia misa laboro, almonro de akiritaj faktoj kaj senĉesa alvoko al saĝo, ni ricevas aliĝojn de sekcioj de la publiko kiuj se ni povas teni ilin, kaŭzos la finan kompletigon de niaj klopodoj en rimarkinde mallonga tempo.

Tio kondukas nin, en nia konsiderado, al la tria tipo de forlasantoj, kaj la sola tipo kiu valoras la penon por provi konservi lin. Kaj por tiu ĉi tipo de forlasantoj ni devas mallaŭdi nin mem pro niaj instruaj metodoj. Tiu ĉi estas la klaso de komencantaj studentoj kiuj estas altirataj al Esperanto pro sincera deziro ekrilatiĝi kun internaciaj aferoj per Esperanto. Tamen estas nenigeble ke tre multa da tia bonega materialo perdigas por ni antaŭ la fino de la unua kurso de la lingvo. Ili perdas la intereson. Ili forlasas. Kial? Nu, kelkaj ne havas la persistemon por daŭrigi la rilate malgrandan kvanton da peno kaj laboro, kiun oni bezonas por akiri bonan scion de Esperanto. Pro tio ili estas mallaŭdindaj. Sed pro kio ni instruantoj estas riproĉindaj estas ĉar ni ne faras niajn klasojn rekta enkonduko al praktika internacia interkomunikado. Ĉu ni komprenas ke longtempe antaŭ ol studento estas preta por ekzameno pri simpla kapableco li estas tute kapabla por interŝanĝi simplajn poŝtkartojn kun similaj studentoj en aliaj landoj? Kiom da profesoroj faris de tio la celon de la elementa paŝo de sia instruado? Tiam anstataŭ la fabela tipo de unua legolibro kion oni opinias pri la kunmetado de unua legolibro per ĝusta elekto el la anekdotoj, novaĵoj kaj plej facilaj

artikoloj de la nuntempaj Esperanto revuoj? Kial ne instigi ĉiun klasanon preni malsaman eksterlandan gazeton, kaj tiam interŝanĝi ilin en la klaso?

Helpu la komerciston aŭ profesiulon dum li estas ankoraŭ en la klaso interrilatiĝi kun samfakuloj tra la mondo, kaj tio kiel eble plej baldaŭ. Korektu liajn leterojn por la unuajn respondojn el la eksterlando. Pli malfrue, samtempe kun la Krestomatio, kiun la aŭtoro, dum temas pri tio, konsideras kiel sine qua non de plena Esperanto edukado), la klaso komencu tian informan materialon kiel Eŭropo ĉe la Abismo de Nitti, La Sendangereco de Francujo de Honorat, For la Batalilojn de von Suttner aŭ novelojn kiel Viktimoj, Pro Iŝtar de Luyken, aŭ la Polan, Bulgaran aŭ Katalunan Antologion. Zorgu ke la progresintaj studentoj skribu disertaciojn kaj artikolojn ne kiel teoria ekzerco, sed (post korekto) por efektiva publikigo en eksterlandaj Esperanto revuoj, kiuj estas nur tro feliĉaj ricevante tiajn artikolojn el eksterlando.

La Deklaracio de Boulogne, tiu mirinda larĝa kaj sana konstitucio de nia movado, difinas Esperantiston kiel «persono kiu scipovas kaj uzas Esperanton». La scion kaj la praktikan uzadon estas ambaŭ necesaj por formi veran Esperantiston, kaj laŭ nia opinio se la profesoroj atentus pli la lastan punkton estus malpli da forlasantoj el niaj klasoj.

El «Amerika Esperantisto»  
tradukis J. J.

#### RAPORTO PRI LA JARO 1926a.

Sekve de la morto de nia ideala unua sekretario, S-ro Posener, mi prenis sur min la taskon prezenti al vi raporton pri nia agado dum la jaro 1926a.

Antaŭ ĉio mi deziras esprimi nian profundan respekton kaj senfinan dankon al la memoro de nia senlaca kaj sinoferema kunbatalanto kiu simboligos ĉiam por ni la plej puran komprenon de esperantisto. La plej bona honorigi, kiun ni povas doni al li, estas ke ni agu kaj laboru kiel li montris tion al ni.

**Propagando.** — Ĉar la propagando por Esperanto estas la ĉefa celo de A. P. P. K. ni senĉese laboris tiudirekte. La organizo de paroladoj, ekskursoj kaj festoj estis nur okazoj por montri la ekzistadon de nia lingvo al la nescianta publiko. Laŭ pura propaganda vidpunkto ni nur konsideras la disdonadon dum la monato oktobro de 25.000 flugfoliojn en Antwerpen kaj antaŭurboj por konigi la necesecon de Esperanto kaj por instigi la loĝantaron ĉeesti la oficialajn vesperkursojn en nia urbo. Kvankam ni eble ne rikoltis la atenditan rezulton, ni ne malkuraĝigu sed pacience, obstine daŭrigu nian klopodadon. Ni ankaŭ ne forgesu mencii la «esperantan semajnon», kiun A. P. P. K. organizis de la 18a ĝis la 25a de julio kaj kiu bonege sukcesis. Ekskursoj, paroladoj, festoj sin sekvis dum tuta semajna kaj estis la pruvo kio bone komprenata kunlaborado povas efektiviĝi.

**Paroladoj.** — Krom la paroladoj okazigitaj de aliĝintaj grupoj al kiuj ĉiam estis invititaj la anojn de la aliaj societoj, A. P. P. K. aranĝis publikan paroladon Esperantlingvan en la urba industria lernejo la 23an de julio. S-ro Neŭzil, lernejestro en Olomouc (Ĉeĥoslovak-

ujo), parolis pri Ĉeĥoslovakujo, la Sokolaj festoj kaj la insureado. Ĉirkaŭ 50 personoj ĉeestis.

**Ekskursoj kaj vizitoj.** — La 18an de aprilo A. P. P. K. duan fojon vizitis la Reĝan Muzeon de Belaj Artoj sub la sperta gvidado de la konservisto S-ro A. Cornette.

La 9an de majo A. P. P. K. faris tuttagan ekskurson al Koningshoyekt, Berlaer kaj Kessel. Gesamideanoj el Lier kaj Mechelen akompanis nin. En Koningshoyekt ni estis tre afable akceptitaj de S-ino Baeyens kaj S-ro Gevers-Baeyens, kiuj gvidis nin tra sia belega parko kaj montris al ni sian taman kokbredejon.

La 27an de junio okazis ekskurso al Mechelen kaj ĉirkauaĵoj, kiu bonege sukcesis.

La 18an de julio ĉiuj grupoj de A. P. P. K. partoprenis en la boato ekskurso al Vlissingen organiza de «La kelta Vojo» kaj en tiu ĉi urbo konatiĝis kun la ticaj gesamideanoj.

La 21an de junio matene oni ĉeestis kun la eksterlandaj gastoj de naciaj festoj, kiuj multe impresis niajn fremdlandajn samideanojn. Posttagmeze oni kune ekskursis al Hemmen por tie akcepti la standardon faritan kaj donacitan de la bonkora familio Kevelijn. Tie ni amuziĝis ke eĉ la vespera pluvo ne sukcesis rompi nian bonan humoron, skribis S-ro Neŭzi.

La sekvintaĵn tagojn ni gvidis niajn vizitantojn tra la Reĝa Muzeo de Belaj Artoj, la museo riantajn, al haveno, la urba propaganda Oficejo, la diamantborso kaj la diamant metiejoj.

La 28an de novembro ni organizis ekskurson al Lier, kie nia prezidanto iaris paroladon kun lumbudoj pri rimando.

**Festo.** — A. P. P. K. nur organizis unu feston. Ĝi estis grandioza festo okaze de la 2-a datreveno de la fondiĝo de nia komitato. Dum tiu ĉi okazintaĵo ni inauguris nian standardon kaj estis disdonitaj la diplomoj de la oficialaj kursoj. La festo ricevis grandan signiton pro la ĉeesto de eminentaj eksterlandaj samideanoj, de la urba ĉefinspektoro kaj delegitoj de neaŭgintaj grupoj!

**Grupoj.** — Je la komenco de la jaro aliĝis al A. P. P. K. la grupo «La kelta Vojo», kiu tre energie subtenas niajn laborojn.

La «Antwerpen'a Polica Grupo» sciigis al ni ke la regularo de A. P. P. K. malhelpas sian aliĝon. Tamen ĝi certigis nin pri sia kunlaborado.

**Bulteno.** — La Bulteno de A. P. P. K. suffice regule aperis kaj plene pravigis sian ekziston. Ne nur ĝi informis la gesamideanaron pri niaj laboroj sed liveris al niaj legantoj interesajn informojn pri la tutmonda movado kaj eĉ agrablajn literaturajn. Interŝange ni ricevis multajn eksterlandajn revuojn, pruvo ke oni bone taksas nian Bultenon. La aliĝintaj grupoj estas petataj sendi ĉiujn informojn kaj raportojn por ke ĝi respugulu plena la grupan vivadon.

**Estraro.** — Dum la jaro 1926 la estraro konsistis el: Prezidanto: J. Jacobs; vic-prezidanto: J. De Waegenaere; la sekretario: A. Posener; 2a sekretario: J. Cats; kasisto: J. Swalf; bibliotekisto: Mortiers; propagando kaj festoj: F-ino B. Geers.

La komitata regule kunvenis la 1an kaj 2an jaŭdon de ĉiunonato.

**Konkludo.** — Ĉio tio montris ke A. P. P. K. bone laboris dum la pasinta jaro. Per ĉiuj rimedoj ni provis atingi la kunlaboradon de ĉiuj

Antwerpen'aj grupoj kaj ni certe daŭrigos laŭ tiu direkto. Ni firme esperas ke baldaŭ foriĝu la malinterkonsento kiu dividas bedaŭrinde la lokan samideanaron kaj ke regu harmonia kunlaborado, inda je nia movado.

## SOLENA MALKOVRO DE MEMORTABULO SUR LA TOMBO DE A. POSENER.

Nederlanda Putte, vilaĝo sur la landlimo de Nederlando kaj Belgujo, estis la loko, kie okazis dimanĉon, la 27an de februaro, simpla sed impresiga, emociona ceremonio, la malkovro de memortabulo starigita sur la tombo de nia kara samideano A. Posener.

Kvankam pluvegis kaj ventegis ĉirkaŭ 35 gesperantistoj el Antwerpen veturis ĉu aŭtobuse, ĉu vagonare, keĉkaj eĉ bicikle al Putte. Dek gesamideanoj el Bergen op Zoom (Nederlando) ankaŭ venis por partopreni en la soleno kaj por uamaniere esprimi sian profundan estimon kiun nia amiko ĝuis de ili.

Ĉar je tiu ĉi sama posttagmezo oni malkovris la tombŝtonojn je la memoro de naŭ personoj kiuj mortis dum decembro - januaro, multaj respektivaj familianoj baldaŭ tute plengis la ĉambregon, kie unue okazis komuna religia ceremonio.

Poste ĉiu familio iris laŭvice por aparte ĉeesti la malkovron de la memorŝtono sur la tombo de sia kara mortinto.

Kiam estis tempo por iri al la lasta ripozejo de nia bedaŭrata amiko, la ĉielo tomete kompatis nin, la pluvo ĉesis.

Post mallonga, kortuŝa parolado de S-ro rabeno okazis la malkovro de la familia memorŝtono.

Tiam S-ro J. Jacobs, prezidanto de A.P. P. K., priskribis per belege elektitaj vortoj la ageman vivon de A. Posener en la Esperanto movado, vivo, kiu, ho ve! estis fortranĉita tiel subite. Profunde emocia momento estis kiam la parolanto alvokis la bedaŭrata samideano kaj oni forprenis de la memortabulo la verdan flagon, standardon de A. P. P. K., pri kiu S-ro A. Posener tiom fieris. En la blanka marmora tabulo estas skulptita verdan stejon kaj la sekvantan surskribon:

Al nia neforgesebla, paca  
batalanto por ESPERANTO,  
AARON POSENER,  
Unua Sekretario de la  
Antverpena Poresperanto  
Propaganda Komitato.  
Liaj dankemaj admirantoj.

S-ro J. Swalf, prezidanto de A. G. E. D., ankaŭ esprimis la sincerajn dankojn de sia grupo kaj deklamis poemon de li verkitan por tiu ĉi okazo.

S-ro Holleman, prezidanto de la Esperantista grupo de Bergen op Zoom, parolis je la nomo de la eksterlandaj samideanoj ĝenerale kaj je tiu de sia grupo speciale, pri la famo kiun la mortinto ĝuis trans la landlimo kaj deklamis la tre belan poemon «Al vi...» de nia Majstro.

Poste tre mallaŭte kaj malrapide «La Espero». Vere tre impresiga momento!

Delegitoj de la grupoj aliĝintoj al A. P. P. K. kaj de tiu de Bergen op Zoom metis belajn florgarbojn sur la tombon.

S-ro Albert Posener, frato de la kara mor-

tinto tre elekvente dankis je la familio pro la granda honoro kiun oni faris al sia frato.

Poste kiam ĉiuj partoprenantoj estis preteririntaj la tombon kaj salutintaj la familion Posener, oni malrapide disiris.

Kvankam ĉiu okazis en Esperanto, la ceremonio multe impresis ankaŭ la neesperantajn ĉeestantojn.

La nomo de nia kara amiko Posener ne nur restos gravurita en la marmoro, sed ankaŭ en la koro de ĉiu esperantisto.

JOGO.

**RIPOZU DOLĈE. (1)**

Modesta, sindona de ni kamarado,  
Funebro nun estas pri vi en la kor',  
Senlaca vi estis en sinoferado  
Por sankta afer'; ĝin atestu marmor'!

Ne petis vi dankon nek la rekompencan.  
Vi nur klopodadis por vivideal',  
Al kiu vi tute dediĉis la menson,  
Por paca, al ni kara, lingvobatal'.

Ne ĉar gravurite en tiu tabulo  
Vi daŭre vivados; pro via fervor'  
Vi, nobla, sentema, homama bonulo,  
Neniam foriĝos el nia memor'.

Jen venis nun ni per honori la fraton  
Perditan tro frue. Kruela la sort'!  
Fortege, profunde ni sentas la baton.  
Ripozu vi dolĉe en dormo de l' mort'!  
27-2-'27. J. SWALF.

(1) Poemo verkita okaze de kaj deklamita ĉe la malkovro de Esperanta memortabulo sur la tombo de S-ro A. Posener, unua sekretario de A. P. P. K.

**REKTVOJANOJ, SPARU!**

Kvankam ankoraŭ estas vintro, «La Rekta Vojo» tamen anoncas jam tri ekskursojn: 1e al Bergen (Mons) por partopreni la nacian Esp. kongreson dum la pentekostaj tagoj; 2e al Deince por viziti kokinbredojn; 3e al Vlissingen per vaporboato. La datoj de la du lastaj ankoraŭ devas esti fiksataj.

Por povi disponi pri la bezonotaj monrimedoj, L. R. V. fondis ŝparkason. Ĉiuj membroj povas partopreni, ŝparante ĉiusemajne tion, kiom ili volas. Nia kasisto S-ro A. Loema volonte prenas la taskon de «ŝparujestro» sur sin.

**PAROLADO PRI ESPERANTO.**

**Girls' Friendly Society  
(Antwerpen'a Sekcio).**

La parolado pri Esperanto de S-ro prof. Jacobs, kiel anoncite en antaŭa numero de «The Anglo-Belgian Times», estis tre interesa kaj lerniga.

Je la komenco la paroladanto faris multajn senkulpigojn pro siaj tiel-niomitaj mortigaj atakoj al la angla lingvo, sed poste pruvis per sia tre vasta vortoriĉeco kaj vortelekto, sian intiman scion de nia gepatra lingvo.

Li pritraktis la antaŭajn provojn sensukcesajn, datumantajn de la 16a jarcento, por enkonduki internacian lingvon kaj fine la devenon de Esperanto.

Ni oferas niajn dankojn al S-ro prof. Jacobs ĉar li dediĉis al ni du el siaj valoraj horoj je jaŭdo, 10an de februaro.

Laŭ «The Anglo-Belgian Times»,  
(21-2-27.)

**LA ORIGINALA LITERATURO  
EN ESPERANTO.**

Esperanto posedas jam konsiderindan nombron da original - verkaĵoj de aŭtoroj de div. nacioj. Jus aperis nova bukedo da originalaj poemoj de l'hungara poeto Julio Baghy.

I. E. S.

**LA TEKNIKA GAZETARO  
KAJ ESPERANTO.**

La ĵurnalo de l'svedaj fevojistoj «Signalen» publikigas regule rubrikon en Esperanto.

La neŭtrala scienca organo stenografia «Deutsche Kurzschrift» (Germana Stenografio), kiu aperas en Essen, enhavas en ĉiu numero resumon en Esperanto, por apliki la rekomendon de la internacia kongreso de l'teknika gazetaro, kiu konsilis al ĉiuj special-revuoj tiel, faciligi sian disvastiĝon en la eksterlando.

I. E. S.

**GRATULOJ DE A. P. P. K.**

... GIOVANNI VANGELISTA ...

kaj

PAOLA RONCA

geedzoj

Vincenza 28an de Februaro 1927. — Italujo.

**GRUPA VIVO.**

**LA REKTO VOJO.**

Monata Programo de la Sabataj kunvenoj en Hotel Cecil.

Aprilo, la 2an. — Ordinara kunveno: Raporto pri la Bulo.

Parolado de S-ro Foquet pri lia vojaĝo al Hungarujo.

Aprilo, la 9an. — Amuza vespero, sub la gvidado de S-roj Calis, Van den Eynde, Lodema, k. t. p.

Aprilo, la 16-an. — Parolado de S-ro Van den Eynde pri la Malnovaj Stratoj de Antverpeno.

**MONDONACOJ POR LA SUBTENADO DE LA  
BULTENO.**

Profita de ĉiuj okazoj por plifortigi nian organon. La donacojn oni sendu al la kasisto S-ro J. Swalf, August Sniedersstraat, 51, Antwerpen.

Ĉar mi estas la unua	fr. 0.25
Kaj mi la dua	fr. 1.—
Imitu mian ekzemplan	fr. 3.—
De animo de «Nia Ideo»	fr. 2.—
De la Hemixema Grupo	fr. 2.—
Mi sekvas la bonan ekzemplan	fr. 0.50
Fino R. A.	fr. 2.—
Por ke mi dimanĉe ne ĉiam estu sola	fr. 5.—
Ke ĉiuj kunlaboru	fr. 10.—
Je la memoro de mia kunlaboranto	
A. Posener	fr. 5.—
Sub la impresado de la solenajo	fr. 5.—
Floro sur la tombo de S-ro A. Posener	fr. 2.—

# BULTENO

MONATA EL DONO  
DE LA

ANTVERPENĀ  
PROPAGANDA



ESPERSPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

3<sup>a</sup> JARO

N<sup>o</sup> 4-5

APRIL-MAJO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
" 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
" 0.15 Svfr.

## ĜOJIGA NOVAĴO.

Sinjoro C. Huysmans, ministro de sciencoj kaj artoj, kaj sinjoro A. Verschueren, ĉefinspektoro de la Antwerpen'a instruado, honoraj membroj de A. P. P. K.

Ni havas la grandan honoron kaj plezuron sciigi al la gesamideanoj ke sinjoro C. Huysmans, ministro de sciencoj kaj artoj, kaj sinjoro A. Verschueren, ĉefinspektoro de la Antwerpen'a instruado, iĝis honoraj membroj de A. P. P. K.

Konsiderante la grandajn servojn kiujn ambaŭ sinjoroj faris al la Esperanto movado, enkondukante Esperanton en la urbaj vesperkursoj, A. P. P. K. decidis oferi al ili la honormembrecon. Tuj post la ricevo de nia letero ambaŭ eminentuloj jese respondis per tre flatemaj vortoj kaj promesis sian altan subtenon al la laboro de A. P. P. K.

Al niaj eminentaj honormembroj A. P. P. K. esprimas sian dankon kaj bonvenon kaj esperas konservi ilin dum multaj jaroj en la honora loko de sia organizaĵo.

A. P. P. K.

## UNUIGO.

En « *Bulgara Esperantisto* », Februaro 1927, ni legas :

« *Sofio.* — La apartaj kvartalaj esperanto-grupoj unuiĝis kaj fondis komunan societon: Esperantista Societo en Sofio. »

Kun ĝojo ni legis en « *Belga Esperantisto* » la jenan sciigon:

« *ANTVERPENO. Centra Komitato.* Per la iniciativo de la Antverpenaj grupoj fondiĝis antaŭ kelkaj semajnoj *Esperantista Borkantistaro*, en kiu partoprenas kvardekono da anoj, sinjorinoj kaj sinjoroj. »

Vi bone legis, gesamideanoj, « *Centra Komitato* », « *la Antverpenaj grupoj* ».

Sed, ho ve ! tiu-ĉi sciigo aperis antaŭ 18 jaroj (februaro 1909). Kiom la tempo kaj la opinioj ŝanĝiĝis depost tiam ! Tion, kion la gvidantoj de la movado en nia urbo tiam juĝis subteninda, ili nun malŝatas kaj kontraŭbatalas. Kial ?

### ANKORAŬ PRI LA SOLENO A. POSENER.

En « DE ZOOM », gazeto de Bergen-op-Zoom (Nederlando), aperis tre detalan raporton pri la solena malkovro de memortabulo sur la tombo de nia bedaŭrata samideano A. Posener.

Ankaŭ « DE DIAMANTBEWERKER » (5-3-1927), raportis detale pri la sama soleno.

Dum la soleno en Putte s<sup>ro</sup> Schutters faris fotografaĵojn kiuj bone sukcesis. Estas tri malsamaj, formato 8x10, sur poŝtkarto.

1<sup>o</sup> Antaŭ la malkovro dum la parolado de la prezidanto de A. P. P. K.

2<sup>o</sup> Post la malkovro dum s<sup>ro</sup> Albert Posener, frato de la mortinto, dankas.

3<sup>o</sup> La tombo kun la memortabulo.

La fotografaĵoj estas haveblaj je 0,60 fr. po unu, ĉu ĉe s<sup>ro</sup> Schutters, Lange Looibroeckstraat, 256, ĉu pere de s<sup>ro</sup> Jos. Cats, Stierstraat, 2, Antwerpen.

Por esprimi sian dankemon pri tio kion A. P. P. K. faris je la memoro de s<sup>ro</sup> Aaron Posener la familio de nia bedaŭrata sekretario donacis al ni belan grandan portreton de nia mortinta samideano. Ĝi nun ornamas nian kunvenejon kaj ĉiam rememorigos nin pri nia tro frue perdita kunbatalanto.

### Nacia Kongreso.

La XVI<sup>o</sup> nacia Kongreso okazos en Mons dum la Pentekostaj tagoj (4-5-6 junio 1927).

Por ĉiuj informoj oni turnu sin al s<sup>ro</sup> H. Petiau, ĝenerala sekretario de B. L. E., St-Liévenslaan, 60, Gent.

### REZOLUCIO PREZENTOTA ĈE LA OSTEND ROTARY-INTERNACIA KONGRESO.

Pro tio ke la interrilatoj inter Rotary-Klubo kaj Rotary-anoj el diversaj landoj plivastigas, la Rotary-Klubo ĉe Perth Amboy, New Jersey, U. S. A. prezentas por la konsidero de la Rotary-Kongreso ĉe Ostend la peton ke la Kongresanoj akceptu Esperanton kiel la oficialan internacian helplingvon por Rotary Klubo. Tiu ĉi klubo opinias ke la akcepto de Esperanto plifaciligos kaj pligrandigos tiajn internaciajn interrilatojn.

La Perth Amboy Rotary Klubo tutkore jese voĉdonis tiun Rezolucion Marton 30, 1927.

### PASKAJ KONFERENCIOJ EN PRAHA.

Por raporti pri la agado en la lasta jaro kaj por diskuti gravaj kaj urgaj demandoj rilate al nia tutmonda propagando, Internacia Cen-

tra Komitato de la Esperanto-Movado kunvokis al KOMUNA LABOR-KONFERENCO, okazinta en Praha (Ĉeĥoslovakujo) je sabato kaj dimanĉo, 16-17 aprilo 1927 (Pasko).

La laborkonferenco okazis en konekto kun la Internacia Konferenco « Paco per la Lernejo », kunvokita de l'Internacia Eduka Oficejo, Genève.

### VA MONDKONGRESO DE TABAKKONTRAŬULOJ

okazos je 6-8 julio 1927 en Praha.

Esperantistoj, kiuj interesigas pri la idealoj de sentabaka kulturo, bonvolu skribi al Esperantista Tabakkontraŭula Asocio, Wien I, Judenplatz 2, I/II, kiu volonte donos informojn.

### ESPERANTO EN LA PROKSIMA ORIENTO.

#### En Persujo.

La nombro de esperantistoj en Persujo pli kaj pli grandigas. Nuntempe oni preparas ankoraŭ pli intensan propagandon por Esperanto. Ekzistas jam du bonegaj gramatikoj en persa lingvo: « Slosilo de Esperanto », en formo de malgranda broŝuro, havanta la tre malgranda pezon de 10 gramoj, kaj kiu enhavas la tutan gramatikon, la fundamentan vortaron kaj liston de plej uzataj komercaj vortoj, aperos baldaŭ.

#### En Sirio.

Pro la malhelpo de l'lingvoj en Sirio studentoj de diversaj nacioj interesigas vive pri Esperanto. En la Amerikana Universitato de Beirut, 3 klasoj de Esperanto kun 60 lernantoj, estas ĵus organizitaj sub la direkto de instruistoj de lingvoj araba, persa kaj armena.

Esperanto-grupo en tiu ĉi urbo estas en formado.

#### En Turkujo.

En Turkujo Esperanto havas anojn ĉie. En diversaj lokoj estas esperanto-grupoj kaj Universala Esperanto Asocio havas delegitojn en la gravaj urboj. Lastatempe Turka Esperanto Asocio estas fondita kun oficiala aprobo.

La plej aktiva grupo estas tiu de Konstantinoplo sub la prezido de l'turka ingeniero Hilmi Djelil Bej. Dro. Ali Fuad Bej, ĝenerala inspektoro de higieno de Konstantinoplo ankaŭ estas fervora esperantisto.

#### La Fervojistoj kaj Esperanto.

La oficiala organo de l'visaj fervojistoj ĵus enkondukis en siaj tri eldonoj « Der Eisen-

bahner» (en germana), «Le Cheminot» (en franca) kaj «Il ferroviere» (en itala) permanentan Esperanto-rubrikon. Estas dezirinde, ke aliaj teknikaj organoj sekvas ĉi tiun ekzemplon, kiu havas grandan gravecon por ĉiuj fervojistoj kaj antaŭ ĉio por la oficistaro de l'ekstera servo.

#### Esperanto per Radio.

Ankoraŭ unu germana stacio de radio, tiu de Langenfeld (Rejnlando) disaŭdigis la 29 januaro programon en germana lingvo kaj en Esperanto. La stacio de Kaŭnas (Kovno) en Litovio komencis kurson de Esperanto la 2 februaro. La posteno W.P.C.H. en New-York dissendas ĉiun merkredon en angla lingvo kaj en Esperanto.

La stacio de Sremska (laŭ la ekzemplo de aliaj siberiaj stacioj) faras same de post kelka tempo.

La baltaj stacioj de radio ankaŭ enkondukas Esperanton en siajn programojn. La 7 februaro 1927 la stacio de Tallinn (Estonio) disaŭdigis la unuan lecionon de kurso en nia lingvo.

La 25 februaro la stacio de Falun (Svedujo) donis programon artistan tute en Esperanto, kiu estis varme salutita en la eksterlando. La Sveda Esperanto-Federacio aperigis je tiu ĉi okazo specialan numeron de sia organo «Svenska Esperanto-Tidningen» tute dediĉita al Radio.

#### La foiroj kaj Esperanto.

Same kiel por la antaŭaj jaroj, la Oficejo de la Foiro de Leipzig publikigis prospektojn en Esperanto ankaŭ por la printempa foiro de 1927.

La Foiro de Budapest ĵus disdonis belajn afiŝojn en tiu ĉi lingvo pri la proksima foiro, kiu okazos de l'30 aprilo ĝis 9 majo.

#### La internaciaj foiroj kaj Esperanto.

Kiel dum la antaŭaj jaroj, la foiroficejo de Frankfurt a.M. distribuis ankaŭ por la printempa foiro de 1927 tre artiste presitan prospekton en Esperanto. La foiro ankaŭ aperigos en Esperanto registron de branĉoj kun traduko en 5 lingvoj.

#### Enkonduko de Esperanto en la sudslava fervojaro.

Per dekreto de 21 marto 1927 (G. D. nro. 6071/927) la Ministerio de l'Trafiko de l'Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj decidis la uzon de Esperanto kiel helplingvon por la

surskriboj kaj avizoj al voĵagantoj en la internaciaj vagonoj de Sudslavio.

Ni petas la esperantistojn disvastigi tiun ĉi informon kaj sendi ĉiujn gazetaltrancĉaĵojn pri tio al Internacia Centra Komitato de la Esp. Movado, 12 Bd. du Théâtre, Geneve (Svislando), por speciala celo. Multan dankon.!

#### La stenografio kaj Esperanto.

La stenografia gazetaro akceptas kun intereso debatskriban alfaron por Esperanto de la germana sistemo de Stenografio laŭ Stolze-Schrey de sinjoro Robert Kreuz, ĝenerala sekretario de l'Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado. La debatoj de l'lasta universala kongreso de Esperanto en Edinburgo estas postskribitaj de du stenografoj de l'sistemoj Stolze-Schrey kaj Pitman.

Lastatempe la nova oficiala sistemo en Germanujo (Reichskurzschrift) estis adaptata al Esperanto de renomita germana stenografo, Karp Wallon, la senioro de l'germana esperantistaro.

Profesoro Scheller en Hildburghausen (Turingio) publikigis adaptajon de la stenotahigrafio al Esperanto.

La komitato de l'skolo Arends (sistemo tre disvastigita inter la germana laboristaro) ankaŭ decidis ellaborigi alfaron de tiu ĉi sistemo por Esperanto.

La germana stenografala sistemo Palm estas adaptita al Esperanto de Sinjoro Wingen, la konata stenografo de l'Urba Parlamento de Köln kaj aŭtoro de alfaroj de tiu ĉi sistemo al la angla, franca kaj nederlanda lingvoj.

#### La turismo kaj Esperanto.

Esperanto estas pli kaj pli uzata en la turismo. La Oficejoj de turismo de Köln, Budapest kaj Neuchâtel aperigis ilustritajn gvidlibrojn, redaktitajn en Esperanto.

#### La teknika gazetaro kaj Esperanto.

Imitante la ekzemplon de aliaj ĵurnaloj teknikaj kaj sciencaj, la Revue Sténographique Belge (Sistemo Duployé) publikigas de post sia numero de februaro 1927 resumojn de Esperanto en ĉiu numero.

#### La tramoj de Vieno kaj Esperanto.

La policistoj de Vieno, kiuj parolas Esperanton, portas sur siaj uniformoj insignon, kiu permesas ekkoni ilin en la strato. Same estos estonte pri la tramkonduktoroj laŭ ordono de la direkcio kaj konforme al rekomendo de la trafika komisiono.

## LA PLEJ GRANDA HISPANO LEKSIKONO KAJ ESPERANTO.

La ekzemplo de la granda hispana leksikono «Espasa» estas signifa. En tiu ĉi monumenta verkaĵo ĉiuj vortoj de l'nomenklaturato estas akompanuoj de traduko en pluraj lingvoj kaj en Esperanto.

### ESPERANTO ĈE LA BLINDULOJ.

Esperanto estas instruata en preskaŭ ĉiuj blindul - lernejoj de la mondo, ĉar la presajoj en reliefa Braille - skribo estas tre multekostaj kaj ilia nombro tre limigita en ĉiu lingvo. En Esperanto la blinduloj de ĉiuj landoj havas sufiĉe konsiderindan komunan literaturon kaj tre disvastigitan internacian revuon. La unua Radio-jurnalo por blinduloj en Esperanto ĵus estas lanĉita de la granda eldonejo franca Chiron en Parizo.

### SIPVETURADO AL DANZIG.

Okaze de la XIXa Universala Kongreso de Esperanto, laŭ preparolo de nia Samideano Georges Delanoue, Cofdelegito de UEA en Paris, la « Compagnie Générale Transatlantique » konsentis pri la jena arango:

Eventuala forveturo el Le Havre (Franc.) la 21-an/23-an de Julio 1927, per la vaporsipo « LA POLOGNE », al Gdynia, apud Danzig, tra la Kanalo de Kiel.

Daŭro de la surmara vojaĝo: tri tagoj kaj 10 horoj.

Specialaj favorprezoj por Kongresanoj:

- 1-a klaso: 500 francaj frankoj, el Le Havre, ĉio enkalkulata;
- 2-a klaso: 350 francaj frankoj, el Le Havre, ĉio enkalkulata;
- 3-a klaso: 250 francaj frankoj, el Le Havre, ĉio enkalkulata.

Rimarkoj:

a) Tiu projekto estas inda je la atento de ĉiu kiu dumsomere volas profiti malmultekostan kaj ripozigan ŝipveturadon sur trunkvilaj maroj.

b) Se el Britlando, Belgujo, Nederlando, Danmark, ktp., estos sufiĉe multnombraj enskribigintoj, la ŝipo haltos ĉu en Dover, ĉu eventuale en alia haveno de la Norda Maro.

c) Estas nepre necese enskribiĝi kiel eble plej frue, por ke tiu interesa arango efektiviĝu. Estas disponeblaj nur: 25 lokoj en 1-a kl.; 65 lokoj en 2-a kl.; 250 lokoj en 3-a kl.

d) Por pliaj sciigoj kaj enskribiĝo kun antaŭpago, sin turni al « Compagnie Générale Transatlantique » (Inspection Générale des

Passages), 6, rue Auber, Paris IX. Skribi nacilingve aŭ per Esperanto.

e) Principe la laŭvola retroŝipveturado al Le Havre povos okazi nur ĉirkaŭ la 8-a/10-a de Aŭgusto, laŭ jam nuna enskribiĝo.

f) Tre verŝajne, post la 20-a/25-a de Junio, oni ne plus povos enskribiĝi.

Kaj nun la flirtado de la verda Flago dependas de la Esperantistaro.

## EKSPOZICIO DE ESPERANTO.

Sekve de peto de A. P. P. K. sinjoro E. Anseele, ministro de P. T. T., senpage metis je nia dispono domon kun granda elmontra fenestro, en Lange Nieuwstraat, 108, Antwerpen, por en ĝi organizi ekspozicion de Esperanto. La domo staras en plena centro de la urbo kaj do tre bone taŭgas por la propagando. Per la ekspozicio A. P. P. K. deziras festi la 40an datrevenon de la apero de Esperanto kaj prepari la XXan universalan kongreson. La ekspozicio daŭros almenaŭ tri monatojn: de la 1-a de majo ĝis la 31an de julio. Pro la graveco de la entrepreno ni afable petas la kunlaboradon de ĉiuj gesamideanoj, entreprenoj, eldonistoj, per la alsendo de afiŝoj, reklamiloj, flugfolioj, libroj, kovertoj de libroj, k. t. p. Oni sendu ĉion al la sekretariino: F<sup>ino</sup> A. Van Ganse, Boomgaardstraat, 77, Antwerpen.

### Ekskurso al Vlissingen.

(Provizoraj Komunikoj)

La 10an de Julio, « La Rekta Vojo » organizos boatan ekskurson al Vlissingen per vaporsipo « WAASLAND », kune kun la fame konata societo « Vondel ». La partoprena prezo por membroj de A. P. P. K. kaj aliĝintaj grupoj estas 11 fr. Por aliaj gesamideanoj, familianoj kaj geamikoj 13 fr.

La horo de foriro provizore estas fiksita je 7.30a matene.

La nombro da partoprenkartoj estos limigita. Oni sin enskribigu ĉe s-ro A. Lodeima, Kalversstraat, 12, Antwerpen-Dam, aŭ sabatovespere je la 8a en Hotelo « Cecil », Van Arteveldestraat, 8, ĉambro n° 23.



## ANEKDOTO

« Oni ne povas kulpigi mian klienton », ple-  
das juna sed ruzega advokato, « ke li perforte  
penetris en la domon de la plendanto.

« Ĉar li rimarkis ke la fenestro de la salono  
estis kvaronmalfermita, li enŝovis sian dek-  
stran brakon tra la malfermajo kaj proprigis  
al si kelkajn senvalorajojn.

Nu, la brako de mia kliento ne estas mia  
kliento mem kaj mi dubas ĉu vi povos kon-  
damni lin, ĉar unu el lia brakoj pekis. »

— Tio estas bone pripensita kaj bele respon-  
dita », respondis la juĝisto, « sekve mi kon-  
damnas la brakon de la kulpigato je unu jaro  
da malliberigo ; kio koncernas lin, li akom-  
panos sian brakon aŭ reiros hejmen, laŭ lia  
plaĉo ».

Kaj la kulpigato trankvile disraŭbas sian  
dekstran brakon, kiu estas el ligno, metas ĝin  
sur la tablon de la juĝisto kaj ankoraŭ pli  
serene forlasas la tribunalon.

La ĉeestantaro ridegas, kompreneble !

A.

## GRUPA VIVO.

### LA REKTO VOJO.

#### Monata Programo de la Sabataj kunvenoj en Hotel Cecil.

**Sabaton la 7an de majo.** — Parolado de S-ro  
Van den Eynde pri « La pligrandigo de nia  
Urbo ».

**Sabaton, la 14 an.** : Studado per konkursoj.

**Sabaton, la 21 an** : S-ro Lodema. Priparolado  
de-kaj prelego el « La Verdkata Testamento ».

**Dimanĉon, la 22 an** : ekskurso al Contich-  
Wilryck ; vizito al fama kokinbredejo kaj  
kunveno al la Proĝejo de Berchem je la  
1 1/2 h.

**Sabaton, la 28 an** : Deklamado. — Generala  
kunveno. — Kongresaj informoj.

**Sabaton, la 4 de junio** ne okazos kunveno. —  
Kongreso en Mons.

### REKTOJANOJ, SPARU!

Kvankam ankoraŭ estas vintro, « La Rekta  
Vojo » tamen anoncas jam tri ekskursojn: 1e al  
Bergen (Mons) por partopreni la nacian Esp-  
kongreson dum la pentekostaj tagoj; 2e al  
Deinze por viziti kokinbredejon; 3e al Vlissin-  
gen per vaporboato. La datoj de la du lastaj  
ankoraŭ devas esti fiksataj.

Por povi disponi pri la bezonotaj monrimed-  
oj, L. R. V. fondis ŝparkason. Ĉiuj membroj po-  
vas partopreni, ŝparante ĉiusemajne tion, kiom  
ili volas. Nia kasisto S-ro A. Loĉema volonte  
prenas la taskon de « ŝparujestro » sur sin.

### NIA IDEO.

Montrigis antaŭ nelonge, la unuaj sunradioj  
anoncantaj la baldaŭnan vintroflonon. Feno-  
meno, kiu ĉion reverdigas, ĉu ankaŭ estas vi  
kiu vekigis nian grupon ? ĉar ĝi efektive vek-  
igis kaj pli laboreme ol antaŭe, jam sentigis  
sian decidon, dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la  
ĉiamsama celo : la disvastigo de nia kara  
lingvo.

Ĝi ankaŭ celas la perfektigon en la lingvo  
de tiuj kamaradoj kiuj adeptis nian idialon.  
Ĝi do projektas organizi dum somero novan  
kaj perfektigan kursojn kies komenco estos  
komunikotaj pere de la Bulteno (A.P.P.K.).

La interna vivo de nia grupo do ne nur  
fariĝos agrabla sed ankaŭ interesa kaj lern-  
niga. La membroj tion jam rimarkis ĉar la  
lastaj kunvenoj plene sukcesis ; la membroj  
plej parte ĉeestis. Ili sentas ke nur la grupo  
kiu, ekster la esperanta movado, celas la  
materialan plibonigon de ilia reciproka situa-  
cio, konkordas plene kun iliaj deziroj. Iliaj  
komunaj interesoj ne diferencas kaj tiun pun-  
ton ili precipe uzos estonte por konvinki la  
neesperantistajn sampensulojn pri la utileco  
kiun nia lingvo prezentas por la internaciaj  
rilatoj, ktp.

Nenia forto haltigos tian penadon kaj plene  
konsciante sian devon, ĝi ĉiam daŭrigos sian  
nelacigeblan obstinecon por fine prezenti al la  
loka esperantistaro unu el la plej fervoraj  
grupoj.

THÉODO.

**Naskigo.** — Al Ges-roj Theo MORTIERS-  
LANGENDRIES, prezidanto de « Nia Ideo »,  
naskiĝis flino Palmyre.

Gratuloj de A. P. P. K.

### PRAKTIKA LERNOLIBRO.

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn  
lado de Sro Th. Cart. — 192 paĝoj. — Prezo:  
6 Fr.fr. krom sendkostoj.

Deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotter-  
damstraat, 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.  
ilustritaj poŝtkartojn, eldonitajn de A. P. P.  
K. (kolekto Nels).

Haveblaj: A. P. P. K., Groote Beerstraat, Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva: flandra, Esperanta, franca; do ankaŭ uzeblaj de neesperantistoj.

### ILUSTRITAJ POSTKARTOJ.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernolibron ilustriton: **Cours pratique d'Espéranto**, eldonita de Librairie centrale Esperantiste, Paris, kun antaŭparolo. Aperis 2 malsamaj serioj da 10 kartoj. Prezo po serio: 1 Bfr.

### ESPERANTO INSIGNO.

Verda stelo sur blanka rondo (17 mm.) buton-, broĉ- aŭ pendajformaj; prezo 2.50 Bfr. La plej bela, la plej malkara! Havebla ĉe ĉiuj anoj de A. P. P. K.

Centra deponejo: Kalverstraat, 12, Antwerpen.

### Ricevitaj.

**Das scharfe Auge** (La akra Okulo), neregule aperanta gazeto por biologia okulkuracarto. Prezo po numero 0.20 germ. Mk. Eldonas: E. Preibisch, Liegstr., 65, Eilorf a. S., Germanujo. — **Holanda Esperantisto**. 3 Marto 1927. — **Oomoto**. Marto 1927. — **La Revuo Orienta**. Marto 1927. — **Pola Esperantisto**. Marto 1927. — **International Language**. Aprilo 1927. — **Arbeider-Esperantisten**. Jan.-Febr. 1927. — **Bulgara Esperantisto**. Februaro 1927. — **Svenska Esperanto-Tidningen**. Februaro 1927. — **Kolektanto**. Januaro 1927. — **Holanda Esperanto Pioniro**. Decembro 1926. Januaro-Februaro 1927. — **Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio**. Marto 1927. — **Esperanto (U. E. A.)**. Aprilo 1927. — **Le Materialiste**. Marto 1927. — **Licht en Waarheid**. Oktobro-Decembro 1926. Februaro 1927. — **Le Sincériste**. Aprilo 1927. — **Roia**. Marto 1927.

### MONDONACOJ POR LA SUBTENO DE LA BULTENO.

Profitu de ĉiuj okazoj por plifortigi nian organon. Donacojn oni sendu al la kasisto S<sup>ro</sup> J. Swalf, August Sniedersstraat, 51, Antwerpen.

Antaŭa listo frs. 37.75

Bona Esperantisto malamas malinter-	
konsenton .....	1.—
Tri bultenoj .....	1.50
Anino de « Nia Ideo » .....	2.—
P. C. ....	5.—
Kial en « Esperanto » de U. E. A. ankoraŭ	
nenio aperis pri la morto de S <sup>ro</sup> A.	
Posener? .....	1.—
Pro mia retrovita pluvŝirmilo .....	1.—
Mi dankas la afablajn geamikojn .....	1.—
Por ke f <sup>ino</sup> V. d. M. estonte .....	1.—
Demetu ŝian ĉapelon dum la kunveno.	
A. L. ....	1.—
Por ke la aninoj de « La Rekta Vojo » ..	1.—
Pli bone pagu siajn monpunojn .....	1.—
Je la memoro de mia frato .....	5.—
Injo ankaŭ deziras helpi .....	2.—
Profito de l'pipo .....	2.—
Malavarulo .....	5.—
Malriĉulo .....	1.—
Por ke S. ridus .....	1.—
Ĉar mi gajnis la plumon .....	2.—
Por ke.... ..	1.—
Vendado de plumo .....	6.30
Anino de « Nia Ideo » .....	3.—

Sume fr. 82.55

### Kie renkontiĝas la Antwerpen'aj Esperantistoj?

A.P.P.K. La 1an kaj 2an jaŭdon de ĉiu monato, je la 8a vespere en "Centraal Schouwburg", Van Wesenbekerstraat, 10. ANTVERPENAJ GRUPO DE ESPERANTISTOJ DIAMANTISTOJ. La 1an mardon de ĉiu monato, je la 8a vespere, 66-68, Plantijnlei.

ANTVERPENAJ GEINSTRUISTOJ ESPERANTISTOJ. Vidu A.P.P.K.

ANTVERPENAJ POLICAJ GRUPO ESPERANTISTA. En la policlernejo, Gildekamerstraat, 9.

LA REKTA VOJO. Sabate, je la 8a vespere, en Hôtel "CECIL", Van Arteveldestraat, 8.

NIA IDEO. Ĉiu merkredo je la 8.30 vespere, en "Volksgebouw", Meir.

SUDA LUMO. Vidu A.P.P.K.

Presejo: "ESPERO" Antwerpen.

# BULTENO

MONATA EL DONO  
DE LA

ANTVERPEN  
PROPAGANDA  
E  
FORSPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

3<sup>A</sup> JARO

N<sup>o</sup> 6

JUNIO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
0.15 Svfr.

## Bedaura Eraro.

Tute hazarde ni eksciis ke Belga Ligo Esperantista dissendis al la aliĝintaj grupoj du cirkulerojn je la datoj de 14a kaj 30a de aprilo. Ĉar "Suda Lumo" ne ricevis ilin, ĝia prezidanto petis pri tio klarigojn de la sekretario de B.L.E. kaj li ricevis ambaŭ cirkulerojn la 13an de majo. Ni volonte senkulpigas la eraron de la sekretario sed bedaŭras pro la graveco de la enhavo ke ni ne pli frue posedis la informojn enhavatajn.

En la unua cirkulero B.L.E. anoncis ke, dimanĉon, 15an de majo, posttagmeze, post la kunveno de la Liga Komitato okazos en Bruselo, speciala labora kunsido, kiun povas ĉeesti ĉiuj belgaj samideanoj, kiuj deziras priparoli specialan temon pri nia nacia propaganda agado. Ni tutkore aplaudas kaj subtenas tiun ĉi novan ideon, kiu estas la sama kiu starigis A.P.P.K.: doni al ĉiuj samideanoj la okazon interkonatiĝi kaj kunlabori al la komuna afero. Nur el la inter-

ŝanĝado de ideoj naskiĝas la lumo! Se ni estis sciintaj la aferon pli frue, certe diversaj samideanoj el nia rondo estus veturintaj al Bruselo. Dum la mateno ili povis uzi la tempon por viziti la ĉefurbon kaj posttagmeze ĉeesti interesan kunvenon de esperantistoj. Tiam ili estus havintaj agrablan kaj utilan tagon.

La sama cirkulero ankaŭ informis la samideanojn, ke B.L.E. sukcesis akiri rabaton da 35 % je la ordinara prezo de la vojaĝbiletoj por ĉiuj kongresanoj individue. Ĉar ĉiu esperantisto povas ĉeesti la kongreson tiu ĉi informo interesis nin ĉiuj. Ĝi ankaŭ povis inciti kelkajn samideanojn ĉeesti la kongreson. La "Bulteno de A.P.P.K." estus certe komunikinta la sciigon, se ĝi ankaŭ estis ricevinta ĝin. Ofte, jes kutime, oni juĝas la sukceson de kongreso per la nombro de partoprenantoj kaj tial oni nenion povas preterlasi por informi ĉiujn, senescepte, kiuj povus interesiĝi pri la afero.

Ni ĝentile memorigas B. L. E. ne for-

gesi ke flanko de la grupoj aliĝintaj al B. L. E., ekzistas nealiĝintaj kun sama celo kaj samaj bonaj intencoj kaj afable petas estonte ankaŭ informi nin pri ĉiuj aferoj kun ĝenerala intereso.

A.P.P.K.

## XVla Belga Esperanto-Kongreso

Mons — 4-5-6 de junio 1927 (Pentekosto)

Provizora Programo.

**SABATON, 4an de junio 1927 :**

- 17 h. Malfermo de la akceptejo.
- 19 h. Intima kunveno.
- 20 h. Publika propaganda parolado kun lumbildoj en la urbdomo.
- 21 1/2 h. Ĝenerala labora kunsido, dum kiu ĉiu samideano havos la okazon prezenti siajn proponojn kaj rimarkojn pri nia agado.

**DIMANĈON, 5an de junio 1927 :**

- 9 1/2 h. Kunveno de la kongresanoj en la akceptejo.
- 10 h. Oficiala akcepto en la urbdomo.
- 10 1/2 h. Ĝenerala kunsido de "Belga Ligo Esperantista".
- 13 h. Fotografado de la gekongresanoj.
- 13 1/2 h. Festeno.
- 17 h. Vizito al la urbo.
- 20 h. Arta festo kun balo.

**LONDON, 6an de junio 1927 :**

Ekskurso al Belœil.

N. B. La kongreskarto kostas 10.— fr. inkluzive la enirprezon en la parko de Belœil.

La festeno kostas 22.50 fr. inkluzive 1/4 botelo da blanka kaj 1/4 botelo da ruĝa vino.

**LOGADO.** Oni povas rezervigi al si ĉambrojn po 8.—, 10.—, 12.—, 15.—, 20.— fr. k. p. po ĉiu persono. Kelkaj hoteloj faras rabaton por du personoj kune dormantaj en sama lito.

**FERVOJA RABATO.** Ĉiu kongresano, kiu aliĝos sufiĉe frue, ricevos rajtigan karton por aĉeti kun 35% da rabato je la ordinara prezo sian vojaĝbiletan, ĉu de sia loko al Mons kaj revene, ĉu de sia loko al Mons, de Mons al Belœil, kaj de Belœil al sia loko.

Oni pagu al la ĉekkonto n° 1337.67 de B.L.E.

## Jara Festo de A.P.P.K.

Por festi la 3-an datrevenon de la starigo de A.P.P.K. kaj okaze de la disdono de la oficialaj diplomoj kaj donaco al la laŭreato, ni organizos artfeston en nia sidejo "Centraal Schouwburg", sabaton, la 16-an de julio je la 8-a vespere.

Pliaj detaloj aperos en la venonta bulteno.

## Ekspozicio de Esperanto.

Sekve de peto de A.P.P.K. s-ro E. Anseele ministro de P.T.T., senpage metis je nia dispono domon kun granda elmontra fenestro, en Lange Nieuwstraat, 108, Antwerpen, por en ĝi organizi ekspozicion de Esperanto. La domo staras en plena centro de la urbo kaj do tre bone taŭgas por la propagando. Per la ekspozicio A.P.P.K. deziras festi la 40-an datrevenon de la apero de Esperanto kaj prepari la XXan universalan kongreson. La ekspozicio daŭros almenaŭ tri monatojn: de la 1-a de majo ĝis la 31-an de julio. De 2-a ĝis 16-a de junio: ekspozicio de poŝtkartoj, leteroj, esperanto kaj komerco; de la 16-a ĝis la 30-a de junio: literaturaĵoj. Pro la graveco de la entepreno ni afable petas la kunlaboradon de ĉiuj gesamideanoj, entreprenoj, eldonistoj, per la alsendo de afiŝoj, reklamiloj, flugfolioj, libroj, kovertoj de libroj, k.t.p. Oni sendu ĉion al la sekretario: F-ino A. Van Ganse, Boomgaardstraat, 77, Antwerpen.

## Spesmilaj Valorbiletoj kaj spesmilaj Valormarkoj.

Ĉiu scias, ke 1927 estas la 40-a Jubileo de Esperanto, sed ĉu vi ankaŭ scias ke ĝi estas la 20-jara datreveno de la oficiala akcepto de la Spesmila Sistemo?

La 15-an de Aŭgusto 1907 s-ro René de Saussure raportinte pri la kunvenoj de la Scienca Asocio prezentis al la III-a Universala Kongreso, la jenan deziron: „La Kongreso opinias ke la uzado de

helpa decimala monsystemo estus tre utila, kaj esprimas la deziron ke la esperantistoj ekprovu tiun uzon".

La deziro estis unuvoĉe akceptita.

Dek Spesmiroj egalvaloras al 8 gramoj da oro laŭ proporcio de 11 al 12.

De 1907 ĝis la milito la spesmila sistemo estis multe uzata kaj elprovata. La milito kaj postmilitaj monaj malfacilecoj kaŭzigis ĝian tempnan malaperon. Sciante ke multaj Esperantistoj bedaŭris tion, ni nun decidis klopodi la reenkondukon, kompletigante la teoriant sistemon per la praktika aplikado de valor-biletoj kaj markoj.

Posedante kelkajn biletojn kaj malgrandan provizon da markoj oni do facile povas pagi tutĝuste ĉiujn bezonatajn sumetojn sen iaj ajn kostoj, sen kurzaj perdoj, nur enfermante ilin en leteron.

La ricevonto ĉiam povas pagi per tiuj valorajoj siavice, aŭ intersangi ilin ĉe niaj oficejoj aŭ agentejoj aŭ ĉe nia internacia oficejo; post simpla alsendo perletera oni tuj ricevos la egalvaloron en nacia mono, nur kun depreno de leterafranko. (La biletoj ankaŭ estas haveblaj kaj intersangeblaj ĉe la bankfirmo A. v. Leeuwen & Co, Hilversum Holando.

Aperis la 15an de januaro 1927 :

Valorbiletoj Serio AA Noj 1/1000.

je SM 0.50 ruĝe presita sur blua fondo

" 1.— blue " " ruĝa "

" 2.— verde " " verda "

" 5.— brune " " flava "

" 10.— viole " " griza "

La valoroj estas nigre enpresitaj.  
(daŭrigas).

## GRUPA VIVO.

LA REKTO VOJO.

### Raporto pri la R. V. ekskurso al Contich.

(22-5-27)

La vetero estas malbona, do .... la R.V. ekskursas !

Dudeko da personoj kunvenis posttagmeze por viziti la kokinbredejon de la fratoj Leens en Contich. Dum la vizito, ĉiuj interesplene sekvis la klarigojn de nia afabla kondukanto, S-ro Leens kaj post tio, piede iris al Wilryck. Dumvoje, la pluvo estis kelkfoje interrompata de bela vetero. Alveninte en Wilryck la R.V. anoj

kune veturis al la Ruĝa Ĉapelo, kie okazis post granda amuzo kaj tro kvieta elserĉado de multaj glasoj da biero, la fina disigo.

Monata Programo de la Sabataj kunvenoj

Sabaton, la 4an de junio. Ne okazos kunveno.

Dimanĉon, la 5an. Kongreso en Mons.

Sabaton, la 11an. Parolado de S-ro Karnas.

Raporto pri la kongreso.

Sabaton, la 18an. Parolado de S-ro Jacobs

Dimanĉon, la 19an. Ekskurso al S-ta Anjo.

Ludoj, kaj ... ripozo al la Antverpena marbordo; dancado.

Sabaton, la 25an. Ĝenerala kunveno. — Kantado.

Sabaton, la 2an de julio. Amuza vespero; krucvort- kaj aliaj enigmoj.

Sabaton, la 9an. Parolado de S-ro Karnas.

Dimanĉon, la 10an. Ekskurso al Vlissingen

Pli detalajn informojn: vidu specialan artikolon en la venonta bulteno.

### NIA IDEO.

La enskribigo de la novaj lernantoj fariĝis la 2an de majo pasinta.

Tiokaze, trafa klarigo pri la utileco de nia lingvo estis farita de Piet Van Sitteren. Skizante la grandan signifon de esperanto per bone elektitaj vortoj li plene sukcesis kapti la tutan atenton de la ĉeestantoj, kiuj varmege aplaudis la paroladanton.

Ni varbis dekunu novajn lernantojn.

Nia sola penado estas zorgi ke ili ĉiuj, senescepte, fariĝu bonaj esperantistoj en la vera senco de l'vorto t. e. uzi cirkonstanco la lingvon.

Ili certe ne forlasos la aferon ĉar oni ne trompis ilin dirante ke esperanto estas lernebla en kelkaj tagoj.

Ili ne ignoras ke, por lerni ĝisfunde la lingvon kaj ĝin uzi senerare, estas necese ekzercadi bone, longe kaj ofte - kun persistemo. Inter tiuj amikoj troviĝas lernantoj por la venontaj oficialaj kursoj. Ni preparos ilin kaj samtempe ni instruas tiujn membrojn kiuj dum vintro ne havas la okazon sekvi la urbajn kursojn.

Oni ne povas supozi ke NIA IDEO flankenigis de la ĝis nun sekvita vojo. La malnovaj membroj mem tro bone spertis ke nur daŭrema lernado certigas la sukcesplenan finon.

Same kiel Pola Esperantisto, Amerika Esperantisto kaj la Sennacia Asocio Tutmonda ni ne logas la popolon per la blufi ke nian lingvon oni lernas en kelkaj lecionoj ĉar multaj personoj, logite de tiu reklamo, forlasas la aferon post konstato ke oni trompis ilin.

La grupo NIA AGO ankaŭ komencas novan kurson kaj pri tiu grupo, kiu en la proksima estonteco fariĝos forta, ni ne bezonas ion diri. Ĝia agado tute similas al nia.

Alia notinda fakto :

Nia ano, kamarado Verhulst, gvidanto de la esperanto kurso por geknabskoltoj en St Mariaburg, faris dum festo publikan paroladon pri nia Majstro kaj lia lingvo.

NIA IDEO, sendube aprobita de la loka esperantistaro, korege gratulas kamaradon Verhulst.

THEOOO.

#### ILUSTRITAJ POSTKARTOJ.

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn ilustritaj postkartojn, eldonitajn de A. P. P. K. (kolekto Nels).

Aperis 2 malsamaj serioj da 10 kartoj.

Prezo po serio: 1 Bfr.

Haveblaj: A. P. P. K., Groote Beerstraat, Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva: flandra, Esperanta, franca; do ankaŭ uzeblaj de nesperantistoj.

#### PRAKTIKA LERNOLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernolibron ilustriton: *Cours pratique d'Espéranto*, eldonita de Librairie centrale Esperantiste, Paris, kun antaŭparolo de Sro Th. Cart. — 192 paĝoj. — Prezo: 6 Fr.fr. krom sendkostoj.

Deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotterdamstraat, 91, Antwerpen.

Speciala rabato por grupoj.

#### ESPERANTO INSIGNO.

Verda stelo sur blanka rondo (17 mm.) buton-, broĉ- aŭ pendajformaj; prezo 2.50 Bfr. La plej bela, la plej malkara! Havebla ĉe ĉiuj anoj de A. P. P. K.

Centra deponejo: Kalverstraat, 12, Antwerpen.

#### Bibliografio.

Amerika Esperantisto, aprilo. — Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista (I.S.A.E.) kaj de Sekcio de Teknikaj Vortaroj, aprilo. — Esperanto (U.E.A.), aprilo.

— Holanda Esperantisto Pioniro, marto — Nederlanda Esperanto Asocio (N.E.A.), februaro. — Nederlanda Katoliko, februaro. — Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio, aprilo. — International Language, majo. — La Revuo Orienta, aprilo — La Suda Kruco marto — La Unuigita Tuthomaro, marto-aprilo — Oomoto, aprilo — Pacifika Espero, marto-aprilo. — Vegetarano, aprilo. — Le Sincériste, majo — Licht en Waarheid, aprilo. — Roia, aprilo-majo.

Internacionalstenografio, sistemo de stenografio internacia por ĉiuj lingvoj: Gvidilo en Esperanto de F. De Kunovski, eldonejo : Lübecker Strasse, 63. Essen-Ruhr, Germanujo. — Prezo : 1 Rm. Fajreroj, unua poemaro de Adalberto Smit. Eldonis Holanda Esperanto Oficejo, Laren, Holando. Miraklaj Aventuroj de Sinjoro Longkruru'o, rime verkita kaj eldonata de Dreves Uitterdijk, L.K., Domo Zamenhof, Hilversum, Holando. — Prezo : SM. 1.25.

8<sup>te</sup> Esperanto-Catalogus van de n. v. Centrale Esperanto Boekhandel, Bankastraat, 2-a, 's Gravenhage, Holando.

Torquay, la Juvelo de Suda Britujo, flugfolio ilustrita eldonita de Torquay Publicity Committee & Turisma Servo de U.E.A.

XIXa Universala kaj Internacia Foiro de Paris, 14-29 majo 1927, flugfolio ilustrita. Prospekto de la Aŭtuna Foiro en Leipzig, kun listo de la komercaj branĉoj reprezentataj en la specimenofoiro.

Dokumentaro pri la Universala Spesmila Banko, Laren, Holando.

#### MONDONACOJ POR LA SUBTENADO DE LA BULTENO.

Profitu de ĉiuj okazoj por plifortigi nian organon. Donacojn oni sendu al la kasisto S<sup>ro</sup> J. Swalf, August Sniedersstraat, 51, Antwerpen.

Je la memoro de mia frato	fr. 5.—
Por tri bultenoj	2.—
Por ke mia "por ke" realiĝu!	2.—
Je memoro	1.—
P.P.	5.—
Por la propagando de nia lingvo	2.—
Por ke ne pluvu la 4an de junio	2.—
Kaj tamen ni daŭrigos	2.—

Sume fr. 103.55

# BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA  ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: <sup>Gen. 404</sup>  
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

3 <sup>a</sup> JARO	N <sup>o</sup> 7	JULIO 1927
JARA ABONO	BELGUJO : 3.— Bfr.	EKSTERLANDO 1.25 Svfr.
UNU NUMERO	0.30 Bfr.	0.15 Svfr.

## 3a JARFESTO.

Okaze de la 3a *Datreveno* de la fondo de A.P.P.K. kaj de la disdono de memoraĵo al la diplomitoj de la urbaj *perfektigaj kursoj de Esperanto* ni havas la honoron inviti

### LA GESAMIDEANARON

je la *SOLENA FESTVESPERO*, kiu okazos Sabaton, 16an de julio 1927  
je la 8 1/2 vespere en la granda salono de

"CENTRAAL SCHOUWBURG"  
Van Wesenbkestraat, 10. E. U.

N. B. La esperantistoj havos la eksterordinaran okazon vidi interalie la komedieton "BIETJE" de M. Sabbe en Esperanto, ludotan de profesiaj geaktoroj. Kartoj estas senpage haveblaj ĉe la estraranoj de A.P.P.K.

## Ni volas esperi.

*Kiam oni deziras malembarsiĝi de hundo oni diris ke li havas rabion.*

Pli kaj pli evidentiĝas ke per ĉiuj rimedoj oni intence kreas malfavoran opinion pri la agado de Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato. Tion precipe montras al ni la neamika, eĉ malamika sintenado de B.L.E. kaj de I.C.K. kontraŭ nia komitato. Vane ni klopodis ekscii aŭ diveni la kaŭzojn, kiuj estigis tiun ĉi malagrablan atmosferon. Je la starigo kaj ofte de post tio ni diris kaj rediris ke A.P.P.K. ne estas fondita por kontraŭagi personojn aŭ societojn. Efektive tion klare montras la fakto ke al la prepara kunveno antaŭ la definitiva starigo de A.P.P.K. estis invitataj la gvidantoj de ĉiuj Antverpenaj grupoj senescepte. Pri la celo ankaŭ ne povas esti dubo, ĉar ĝin klare fiksis la regularo: A.P.P.K. celas kunigi ĉiujn lokajn fortojn por racie organizi la ĝeneralan propagandon de Esperanto en nia urbo kaj akceli la enkondukon de Esperanto en la publika instruado. Ĉu en tiu ĉi agado estas io kio povas malhelpi ian esperantiston ne partopreni en ĝi? Eĉ persono kiu povus dubi en la komenco pri la bonaj intencoj de A.P.P.K. havis la okazon konatiĝi kun ili dum la tri jaroj de nia agado. Kun prava fiereco ni rajtas deklari ke ni bone laboradis kaj ke plenfide ni deziras ke nia laboro estu komparata kun tio de aliaj organizaĵoj.

A.P.P.K. fondiĝis, pro la sincera amo al Esperanto, kelkaj fervoraj esperantistoj, kiuj sentis la nepran necesecon koncentrigi niajn ne grandajn fortojn en nia urbo. Se oni deziras efektive alveni al racie organizita movado internacia ne nur estas necese ke ĉiu loka grupo aliĝu al landa ligo kaj ĉiuj landaj ligoj al la internacia centra organizaĵo sed antaŭ ĉio, en grandaj centroj, kie estas diversaj grupoj, tiuj ĉi lastaj devas komenci mem unuiĝi. Ke A.P.P.K. ne ankoraŭ ampleksas ĉiujn lokajn grupojn, ne estas nia kulpo. Ni sufiĉe provis alveni al tiu rezultado, sed vane! Estas bedaŭrinde personoj kiuj tro multe ŝatas sole regi, ol interkonsente kun aliaj.

A.P.P.K. tute ne deziras labori izolite kaj en iu kampo; ĝia starigo mem estas la pruvo de tio. Al gravaj okazintaĵoj el nia komitata vivo regule estis rekte invitataj ĉiuj Antverpenaj grupoj senescepte. La Bulteno de A.P.P.K. estis regule sendita al la estraranoj de B.L.E. kaj al la grupoj aliĝintaj al tiu ĉi ligo. Ni ne povas fari pli.

Sajnas ke Belga Ligo jam klopodis por ebenigi la malinterkonsenton en Antwerpen kaj delegis por tio Sron Schoofs al niaj aranĝoj. Ni ĝojas pri la bonaj sentoj de B.L.E. je nia komitato, sed ni miras kial oni neniam tion komunikis al ni. Ĝis nun certe la delegita persono neniam plenumis sian mision, aŭ ĉu ni devas supozi ke la misio nur konsistis en la ĉeesto de nia festo de 26a de julio 1926, al kiu li estis persone de ni invitita kaj dum kiu li ne diris unu vorton al iu el nia komitato krom forirante al la prezidanto: "Ni iam ankoraŭ parolos unu la alian". Ĉu per tiuj ĉi vortoj interkonsentiga misio finiĝis? Ni ne kredas kaj intertempe volas esperi.

A.P.P.K.

## Vizito de Dro E. Privat.

Ŝajnas ke S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Edm. Privat, vizitis nian urbon la 2an de junio kaj ke tiuokaze estis organizita festo je lia honoro. Invitkartoj estis senditaj al multaj esperantistoj. Sed neniu invitilo atingis A.P.P.K. aŭ grupon aliĝintan al A.P.P.K. aŭ esperantiston apartenantan al unu el tiuj grupoj. Certe ĉiuj esperantistoj ŝatis aŭskulti kaj akلامي la gvidanton de la esperanto movado. Ni nur bedaŭras la partian sintenadon de "La Verda Stelo", kiu prenis sur sin la organizon de la festo. Se Sro Privat venis kiel prezidanto de la Internacia Centra Komitato almenaŭ "Suda Lumo" devis esti invitita, ĉar ĝi tutsame kiel "La Verda Stelo" partoprenas en ĝia organizado, estante grupo aliĝinta jam de antaŭ 18 jaroj al "Belga Ligo Esperantista". Se Sro Privat venis kiel prezidanto de U.E.A., ne estis al iu grupo por fari la neceson por lia akcepto, sed la delegito de U.E.A. por nia urbo, kiu en tiu okazo devis inviti la anojn de U.E.A.



Tiu ĉi lasta solvo estis eble la plej bona, ĉar neniu grupo aŭ persono povus esti ofendita per ĝi. Ĝi estus doninta la okazon al la samideanoj renkontiĝi. Ne estas evitante unu la alian ke okazos interkonsento. Mi ne komprenas kiel estas eble kanti konscie: "*En la mondon venis nova sento*" kiam en sama loko unu esperantisto malbenas la alian nur pro nedaŭra gloro.

S. PERO.

### Kial ?

Foliumante la lastan jarlibron de U.E.A. ni legas sur paĝo 214 :

E. G. : Antverpena Grupo (B.L.E.)

E. G. : La Verda Stelo (B.L.E.)

paĝo 215 :

E. G. : La Suda Lumo.

Kial ne estas menciita (B.L.E.) ĉe la nomo de tiu ĉi lasta grupo ? Ĝi tamen ankaŭ estas grupo aliĝinta de post 18 jaroj : Ĉu estas ĉar ĝi aliĝis al A.P.P.K. ? Ĉu ni devas meti tinn ĉi forgeson en rilato kun la nesendo de informiloj por la komitata kunveno de B.L.E. ?

SUDA LUMO.

### Raporto pri la XVIa Nacia Kongreso en Mons.

Ĉirkaŭ la 4a posttagmeze, la vagonaro foriris kaj mi restis sola meze de tulipoj, sola en haremo kun 6 aliseksaj kreitaĵoj de la sama bona kreinto, kiu ankaŭ tiuokaze zorgis pri bela vetero, radianta suno kaj aliaj bonoj, necesaj por agrabligi la vojaĝon kaj ekmovigi la langojn.

Kantante ni alvenis en Mons, kie nin tre afable bonvenigis du estontaj Mons'aj Esperantistoj.

Post unua interkonatiĝo en la kongresa akceptejo kun Sro Pétiau, sekretario de la B.L.E., ni disiris por vespere trovi unu la alian en la urbdomo, kie okazos la malferma kunsido.

Ĉe la verda tablo ni rimarkis Srojn Pétiau. Casy (kiu, kvankam ne jam estante Esperantisto, tamen aranĝis preskaŭ la tutan kongreson en Mons) Cogen, Schoofs, Champy

kaj Privat. En la salono mem estis, krom la kongresanoj, ankaŭ enloĝantoj de Mons kaj la urbestro, Sro Maistriau.

La vespero estis rezervita al la vulgariĝo de Esperanto.

Sro Privat franclingve paroladis al la enloĝantoj kaj montris al ili tre klare kaj per tre trafaj vortoj la neceson de Esperanto kiel mondlingvo. El lia parolado ni elĉerpis la jenon : Same kiel en Svisujo, la grandaj tuneloj sub la plej altaj montoj ne malplaĉas al la pejzaĝo, sed kvazaŭ nevideblaj estas kaj plifaciligas la rilatojn inter la homojn, tiel ankaŭ Esperanto ne volas malaperigi la belecon de la nacia lingvo, sed konstrui ligilon inter la popoloj.

Longega aplaŭdo estis la sorto de la ŝatata aŭtoro de la "*Vivo de Zamenhof*" kaj de "*Historio de Esperanto*".

Post tiu interesa parolado, Sro Cogen montris rapidege, per lumbildoj, kiel Esperanto estas kunmetita, kaj poste, por provi la taŭgecon, la paroleblecon de la lingvo, li esperantlingve donas la historion de la stenografio.

Jen alvenas la kongresanoj ! Ili iros al la monumento de la mortpafitaj enloĝantoj de Mons. Iu fraŭlino en la unua vico portas florbukedon. Mi haltas kaj lasas preterpasi al mi la tutan kongresanaron. Ili estas sufiĉe multnombraj kaj gaje babiladas inter si. Sur ĉiu vizaĝo oni legas ke estas festotago en Esperantujo.

Kiam la karavano pasis, mi sekvis. Baldaŭ ankaŭ la ceremonia flormetado finas kaj kune ni iras al la kongresejo, la urbdomo, por esti oficiale akceptata kaj por ĉeesti la ĝeneralan kunsidon de B.L.E.

Ĉar la urbestro ne ankoraŭ alvenis, oni atendante ekkomencas la kunsidon sub la gvidado de Sro Cogen, kiu unue legas saluttelegramojn de Sro Witteryck, de S-ino Elsworthy-Posenaer, kaj karton de F-ino Ivonne Thooris. Poste Sro Pétiau sciigas ke Sro Witteryck nepre ne plu volas esti nek prezidanto, nek honora prezidanto de B.L.E. kaj li proponas ke oni nomu lin prezidanto pro honoro, kio estas aprobata de la kunveno. Strange, en tiu sama kun-

veno oni ne anstataŭas la prezidanton ! Ĉu do B.L.E. restos sen prezidanto ĝis la proksima ĝenerala kunveno ?

Sro Kempeneers el Bruselo ekkomencas paroli kaj feliĉe estas interrompata pro la alveno de la urbestro. kiu jam atendas.

La kongresanoj eniras la urbdoman akceptejon. Tie, Sro Casy prezentas ilin al la urba konsilnaro per tre taŭga, mallonga kaj iom sprita parolado. Li bedaŭras ke oni ne ricevis subvencion de la urbo, sed esprimas grandan ĝojon ke la urbestro metis afable ĉiujn salonegojn je nia dispono.

La urbestro akceptas nin en sia urbo per agrabla kaj interesa parolado. Li ĝojas havi la honoron vidi nin en sia urbo, kiu kvankam tre malriĉa, estas tre industria kaj precipe povas fieri pri multaj lernejoj. Loĝas en Mons 27.000 personoj kaj estas inter ili 6.000 lernantoj. Rememorante la paroladon de Sro Privat, dum la antaŭa vespero, li laŭdas la klopodojn de Nungesser kaj Lindbergh, kiuj aldonis parton por pli facile kunligi la homaron kaj malpliigi la distancojn.

*Pro manko da loko la daŭrigo en venonta Buleno.*

### Internacia Junultendaro sur la Kastelo Freusburg.

8-14 Aŭgusto okazos sur la kastelo Freusburg (Rejnlando, Germ.) tendara semajno, al kiu la junularo ĉiulanda kaj ĝiaj amikoj estas invititaj.

Al ĉiuj agadsferoj, la relegia, eduka kaj arta, ekonomia, politika, sociala kaj viv-reforma, el la varieco de la junulara kaj reforma movado, malgraŭ ĉiu konscia kaj konservinda specialeco kaj malsameco de la taskoj, ni volas kunveni en komuna servo je justa kaj paca estonteco. Homoj de bona volo, kiuj en forta memdisciplino kaj respondecado persona vivformado ekzemplodonante volas prepari la venontan homaran komunecon kaj volas helpi unu la alian per reciproka interkompreniĝo kaj frateco, estas bonvenantaj. La internacia helplingvo de la tendaro estos Esperanto. Demandoj kontraŭ duobla afranko (el eksterlando internacia respondkuponon) al Hedwig Eichbauer, Hamm/Sieg, Germanujo.

### Ekskurso al Vlissingen.

Ĉi tiu ekskurso superos tiun de l' pasinta jaro. Ĝis nun proksimume 150 partoprenaj biletoj estas disdonitaj kaj mi tre dubas ĉu ankoraŭ biletoj estos akireblaj.

Ni forvojaĝos la 10an de julio je 7.30a matene de la flotponto Suikerrui. Je la 9a vespere reveno en Antwerpen. Ĉiuj antaŭe pristudu la barometron kaj ĉielon kaj juĝu ĉu estas necese kunporti pluvsurtuton. La societo "Vondel" prizorgos la muzikon, kantistaron trink- kaj manĝaĵon kaj ni zorgu por bona kaj gaja humoro.

Brila vetero jam estas mendita !  
N. B. Ne forgesu viajn pasportojn.

A. L.

### Esperantista Tendaro

en Hofstade, 13an, 14an, 15an de Aŭgusto venonta.

Informojn oni petu kaj aliĝojn oni sendu al Sro J. Karnas, Tölstraat, 27, Antwerpen.

### NASKIĜO.

Al Ges.roj R. De Becker-Leflot en Lier, naskiĝis fileto, nomita Jozef.

Korajn gratulojn.

### MONDONACOJ POR LA SUBTENO DE LA BULTENO.

Profitu de ĉiuj okazoj por plifortigi nian organon. Donacojn oni sendu al la kasisto Sro J. Swalf, August Sniedersstraat, 51, Antwerpen.

Antaŭa listo fr. 103.55

Je la memoro de A. Posener	5.—
Je la memoro de mia frato	5.—
Kvin portretoj de A. P.	5.—
Kiam interkonsento en Antverĝeno ?	2.—
Jo Co	5.—
Por tri bultenoj	2.—
Anino de Nia Ideo	2.—
H. R.	5.—
The	5.—
Mi vendis pipon	1.—
Je la honoro de la bibliotekisto de A.P.P.K.	1.—
A. H.	1.—

Sume fr. 142.55

# BULTENO

MONATA DE EL DONO LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA  FOR ESPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO: <sup>Gen. Kop.</sup>  
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SMIEDER 55 STRAAT 31

3<sup>a</sup> JARO

N<sup>o</sup> 8

AŬGUSTO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
" 0.15 Svfr.

## Grava Okazintajho en la Esperanto Mondo.

La granda salono de "Centraal Schouwburg" estis tute plena je interesiĝanta publiko sabaton, la 16an de julio. A.P.P.K. organizis festvesperon je la honoro de la diplomitoj de la urbaj vesperkursoj de Esperanto. Je tiu okazo oni kunmetis zorge elektitan programon, kiun la artistojn zorge plenumis. S-ino Mark Belloy-Van Troyen, artkantistino, kantis per ĉarma senplena kaj precipe per bone kulturita voĉo arion el "Samson kaj Dalila" de Saint Saëns en la flandra lingvo kaj lulkanton de A. Maertens "Dormu dolĉe" en Esperanto tiel sentplena, ke ankaŭ la ne-esperantistoj estis kortuŝataj. Precipe per sia bela elparolado S-ino Belloy faris pli da propagando por la mondlingvo ol ŝi mem supozis. Necesas ke ni esprimu tie ĉi vorton de danko kaj admiro, despli, ĉar ŝi, kiel ankaŭ la aliaj artistoj, senpage kunlaboris. S-ro G. Jennart majstre akompanis S-ino Belloy per la

fortepiano. F-ino H. Heyens aŭdigis al ni kvar numerojn por fortepiano, kiuj ricevis varman sukceson, precipe la valso de Grieg. S-ro J. Calis kantis per volumplena voĉo ariojn el la operoj "Lakmé" kaj "Hérodiade". Aplauĉego estis lia parto. Al nia amiko Calis estas en la kantado ankoraŭ rezervata bela estonto. S-ro Alf. Van de Velde, veterano en la Esperanto-movado deklamis kun multe da sento "Preĝo sub la verda Standardo" de Zamenhof kaj "Malgajaj Tempoj" de Jan Van Beers.

Post tio komenciĝis la solena disdono de la diplomoj kaj de memoraĵo donacita de A.P.P.K. al la diplomitaj gelernantoj.

S-ro Ministro de Sciencoj kaj Artoj, honora membro de A.P.P.K. kaj S-ro Skabeno pri Publika Instruado senkulpiĝis pro sia neĉeesto per tre afabla letero.

S-ro A. Verschueren, ĉefinspektoro de la Publika Instruado en Antwerpen, kaj ankaŭ honora membro de A.P.P.K., honoris nin per sia ĉeesto kaj, de la podio, ĉirkaŭata de la juĝantaro, geprofesoroj kaj gelaŭreatoj de la Esperanto kurso, faris per

siaj kutima paroladista talento, tian fajroplenan pledon por la mondlingvo, ke ĉiuj ĉeestantoj entuziasmiĝis pro ĝi. S-ro Verschueren, kiu estas por ni forta apogo por la enkonduko de Esperanto en la publika instruado, kvankam li mem ne estas esperantisto, diris altŝatantan vorton al la laŭreatoj, kiuj havis la kuraĝon kaj la persistemon, post ilia ofte laciga taglaboro, sekvi la vesperkursojn ĝis la fino. "Gejunuloj, sekvu tiun-ĉi belan ekzemplon, enskribigu vin la proksiman vintron por la vesperkursoj de Esperanto kaj iĝu viavice la disvastigantoj de la mondlingvo, ĉar mi konvinkiĝis, ke la Esperantistoj celas noblan idealon, tiel parolis S-ro Verschueren, kaj la multnombra ĉeestantaro montris sian kunsenton kun laŭta aplaŭdado, kiu kreskis ĝis ovacio, kiam S-ro inspektoro anoncis ke li enskribigos sin kiel unua lernanto de la venonta kurso.

Post S-ro Verschueren parolis, en Esperanto S-ro Holger Hansen, instruisto en Holbæk (Danujo), pri la utileco de la mondlingvo. Lin alparolis la prezidanto de A.P.P.K., S-ro prof. J. Jacobs, kiu per sia kutima elokventeco ankaŭ faris brilan festparoladon parte en flandra lingvo, parte en Esperanto.

La dua parto de la programo konsistis el la prezentado de la unuaktaĵo "Bietje", de M. Sabbe, tradukita en Esperanto de D-ro W. Van der Biest. Pli belegan interpretadon ni neniam vidis. Kaj tio ne devas mirigi nin. F-ino Marg. Bertrijn, juvela Bietje, Jef De Waegenaere, ambaŭ bone konataj de la Antwerpen'a teatra publiko kaj ankaŭ ekstertio, kaj S-ro Alf. Van de Velde: kun tia trio, kiu elparolas Esperanton flue kaj bele kaj ĝuas tre altan aktoran famon, tio devas iĝi modela prezentado. La ĉeestantaro, tiel ne esperantistoj kiel esperantistoj montris klare per sia aplaŭdado kaj entuziasma kriado, ke oni alte taksis la ludadon kaj la elparoladon.

Post la kutima ofero de floroj al la Sinjorinoj-kunlaborantinoj kaj la kantado de "La Espero", la himno de la Esper-

antistoj, tiu ĉi bela, bone sukcesinta festvespero finiĝis.

Gratulojn al la organizintoj:  
(Laŭ "De Diamantbewerker") JO. SO.

## Raporto pri la XVIa Nacia Kongreso en Mons.

(Daŭrigo)

Li ankaŭ laŭdas niajn klopodojn, ĉar ili estas samcelaj. "La mondo", li diras, nur disvastiĝas laŭ la profundeco kaj laŭ la alteco. Laŭ la profundeco per la scienco, laŭ la alteco, per la artoj, literaturo, k. t. p. ". Li konsideras ke Esperanto apartenas al tiu ĉi lasta, kaj tial ĝi estas inda je merito. Helplingvo estas necesa: eble Esperanto ne estos la elektata, sed eĉ se alia lingvo preferata estas, ni povas fieri pri nia kunlaborado al la ĉefa celo: interkompreno inter la popoloj.

Poste la urbestro aparte salutas la delegitojn el aliaj landoj. Al la franco li diras ke ni estas kvazaŭ fratoj; kiam franco malfermas fenestron, li ekvidas belgan ĝardenon, kaj belgo spiras francan aeron. Al la angla li dankas pro la dummilita helpo kaj rememoras ke estis ili kiuj en 1914 defendis urbon Mons kaj ke ilia sama regimento batale reprenis la urbon en 1918a.

S-ro Cogen respondas per longega dankletero al la bonkoraj vortoj de la urbestro.

Tiam oni trinkis la honorvinon, je la sukceso de la XVIa. Kongreso.

Elirante ni aŭdas sonorilarkoncerton ege belan. Sur la programo estis diversaj naciaj himnoj: franca, nederlanda, angla, belga, esperanta, krom la Tagiĝo de Grabowski. La ludado plaĉis al ni ĉiuj, bedaŭrinde, la ĉeestantoj kunkantis sian himnon kaj tial la muziko de l'sonoriloj ne aŭdiĝis. Mi rimarkis ke S-ro Privat, kiu neniam antaŭe tiel aŭdis nian himnon, forlasis la grupon, por sole ĝui iom aparte la tintadon de la bronzaĵoj kaj buŝetoj.

Post tiu neatendita festeto je nia ho-

noru, ni daŭrigis la interrompitan kunvenon.

S-ro Kempeneers finas.

S-ro Schoofs, ĉefdelegito de U.E.A. skizas la situacion de tiu asocio en nia lando.

S-ro Privat esperantlingve parolas pri U.E.A., instigas nin membriĝi kaj kunhelpi al ĝia pligrandigo. Li trafe rakontas kelkajn skizojn pri nia Majstro kaj alportas al la Belga Kongreso, la saluton de la Holandaj samideanoj. Tiu parolado multe efikis kaj ni ĉiuj estis sub ĝia tre profunda impresio.

S-ro Cogen proponas sendi saluttelegramon al la reĝo. (akceptata)

Alia sinjoro proponas fari la samon al la Rotari-kongreso, ĉar la partoprenantoj estas esperantistoj sen Esperanto. (ankaŭ aprobata)

S-ro Pétiau donas ankoraŭ kelkajn informojn pri la festeno en Waux-Hall.

Waux-Hall estas parko de la urbo Mons. Ĝi aspektas iomete kiel la Antverpena ĝardeno de la Harmonie. En ĝi la kongresanoj estas fotografiitaj; en ĝi okazas la komuna manĝado.

La festeno estis sukceso. Ĉio estis bone preparita. Oninetro longe devis atendi kaj bone manĝis.

Dume oni rondirigis kartojn kaj manĝokartojn por kolekti subskribojn kaj oni ankaŭ ekkomencis toasti je la honoro de diversaj organismoj kaj personoj.

Tre sprita estis du el la tuta aro: unu de S-ro Boutwood, angla samideano, laŭ kiu toasto devas esti kiel la robo de virino, t. e. sufiĉe longa por enhavi la neceson kaj ne tro longa por resti interesa. Li tiam rapide salutis la kongreson kaj daŭrigis manĝi la duonan kokidon. La dua estis paroladeto de S-ro Jaumotte, la prezidanto de la Verda Stelo el Antverpeno, kiu alparolis la ĵurnalistojn, petante ilin en la estonto ĉion enpresi kio rilatas Esperanton. Tuj post tio, la sama sinjoro, kiel ĵurnalista dankis sin mem kaj promesis ĉion kion li demandis.

Je la fino de la festeno ni jam povis konvinkiĝi pri la sukceso de la antaŭe faritaj fotografajoj.

Post tio, oni ludis kaj kantis kaj.... vizitis muzeon.

Vespere, je la 9a ni denove estis kunvokitaj en Waux-Hall, kie okazus artan feston kaj dancadon. Verdire, malgraŭ ĉiuj bonaj klopodoj de S-ro Cogen, la vespero estis malsukceso kaj frue oni foriris.

Pluvas! Ni havos malbonan veteron por iri al Belœil. Oni tamen forveturos.

Uf! La vagonaro haltas; suno brilas dum momento. Ni elsaltas kaj tuj iras al la parko.

En ĝi, ĉiu estas ravita. Plena je profunda admiro, ni rigardas la belaĵojn de tiu loko; grandega lageto, arbaro, ĝardeno, fontanoj, aleoj; ĉio estas impresiga kaj nur vidante oni povas plene ĝui.

Jen estas fontano! Ni alproksimiĝas. Sed, kio estas sur la fundo? Kiel multnombraj brillfolioj de karnalvestaĵo, la fundo brilas kaj aspektas pro la aro da moneroj, kiuj ĝin kovras. Laŭ la popollegendo, junulino, enĵetanta monpecon kiu tuŝas alian, edziniĝos en la sama jaro, junulo edziĝos, kaj edziĝita persono estos feliĉa. Mi ne enĵetis monpecon; sed inter la junulinoj de la R.V. kelkaj kun sukceso enĵetis moneron! Ni daŭrigis la viziton kaj en lageto, ĉirkaŭ la kastelo, ni admiris grandajn karpojn, kiuj certe estis tro grandaj por mia pato.

Post la vizito, B.L.E. daŭrigis en kafeo la malsukcesintan koncerton de la antaŭa tago.

Posttagmeze ĉiu laŭvole amuzis sin kaj je la 6a vespere, Belœil salutis cent kvindek da Esperantistoj je la hejmveturado.

JOKO.

## BIETJE.

Ĉu vi konas "BIETJE", kara leganto?

Ĝi estas flandra, unuakta teatraĵo, ĉiam freŝa, de Maurits Sabbe, en kiu la ludantaj personoj estas: la maljunaj fratoj Jean-Baptiste kaj Monne, kaj Bietje, la 16 jara baptofilino de l'unua.

Laŭ malnova flandra kutimo, nur la pli aĝa estis konsiderata kaj nur pri lia

edukado oni sin iom okupis ; tiel Jean-Baptiste igis notarioficisto.

Li karakterigas sian propran personon per siaj jenaj vortoj al Monne : **MI** laboras ekstere por la speso, kaj la minimumo, kiun **vi** povas fari, estas ja prizorgi la mastrumadon, kaj iom pli bone, ol vi kutimas. Oni rakontis al mi, ke vi ofte tamburetas sur la malnova klavceno, kiam mi ne estas hejme. Zorgu, ke vi ne perdaĉu per tio vian tempon ! Se ne, tiu meblo iros al la vendeĉambro ! ”

Monne, kontraŭe, estas la ĉiam bona kaj ĉion suferanta viro, kies nuraj zorgoj estas plaĉi al Jean-Baptiste, kion li tamen ne sukcesas. Li timas sian fraton, kiu tro facile minacas lin per alsendo al la maljunulejo, ĉe la Fratoj de l'Amo ; kvankam li posedas la 2/3-onojn de la domo en kiu li ambaŭ loĝas.

La tuta unua sceno estas disputeto inter la reganta Jean-Baptiste kaj la subpremata Monne, ĝis kiam eniras Bietje, kiu fine sukcesas repacigi kaj interkomprenigi la du maljunulojn, kiuj tamen nur vivas unu por la alia.

Min tre trafis tiu teatraĵo ; ĉar ĝi precize skizas bildon el la Esperanta movado en Antverpeno. Ju pli mi pripensas, des pli mi konstatas ke en nia urbo ekzistas du kampoj, la Jean-Baptist'a kaj la Monn'a,

Mi ĉeestis la tutan disputeton inter la du kaj ĝis nun nur sukcesis travivi tiun vivrealan teatraĵon ĝis la fino de la dua sceno ; ĉar.... mankas Bietje. Bietjel kiu rekonsiligos ambaŭ paĉojn kaj tiam malaperos per gaja : "Tagon, Paĉjoj! Tagon, Marion! Tagon, Marionnette !....

Ĉu VI konas Bietje'n, kara leganto?  
JUUL KARNAS

### Spesmilaj Valormarkoj kaj Spesmilaj Valorbiletoj.

(daŭrigo)

Aperis la 15an de Februari 1927 :

VALORMARKOJ je 1—2—5—10—25  
SM en kvin diversaj koloroj.

#### KURZA TABELO.

SM 1.— : Angla Ŝilingo . . . . 2.00

SM 1.—	: Germana Marko . . . .	2.06
..	: Holanda Guldeno . . . .	1.22
..	: Orfanko . . . . .	2.53
..	: Usona Dolaro . . . . .	0.49
1	Angla Ŝilingo . . . . .	SM 0.50
1	Germana Marko . . . . .	.. 0.49
1	Holanda Guldeno . . . . .	.. 0.82
1	Orfranko . . . . .	.. 0.40
1	Usona Dolaro . . . . .	.. 2.05

Por aliaj landoj kalkulu laŭ la taga borskurzo de la dolaro je la proporcio 1 Dolaro : SM 2.05.

Pri la kalkulmaniero de la kurzoj, detaloj pri la Spesmila Sistemo el teoria kaj praktika vidpunkto, la biletelmeto kaj ĝia kontrolado, la organizacio de la banko, ĝiaj naciaj oficejoj, filioj kaj agentejoj, la fondota internacia ĝirservo kaj diversaj aliaj detaloj pri la praktika aplikado de la Spesmila Sistemo, vidu nian broŝuron "Internacia Pagilo", akirebla ĉe la Esperantaj libristoj kaj ĉe la Internacia Oficejo de la banko. Prezo afrankita SM 0.20.

Kompletaj kurzaj tabeloj, listoj de societoj kaj firmoj, kiuj akceptas la Valorbiletojn kaj -markojn, listoj de kontuloj, monata transvidtabelo de la banko kaj multaj aliaj aktualaĵoj pri la Internacia Mono aperos en la Monatgazeto „Spesmila Bulteno“ mendebla je la samaj adresoj. Jarabono SM 1.00, nur kontraŭ antaŭpago.

Por aĉeti iun ajn sumon en SM sendu la egalvaloron SM 0.25 por rekomendita afranko poŝtmandate, per bankĉeko aŭ en naciaj monbiletoj.

#### Esperantista Tendaro

en Hofstade, 13an, 14an, 15an de Aŭgusto venonta.

Informojn oni petu kaj aligojn oni sendu al Sro J. Karnas, Tolstraat, 27, Antwerpen.

## Esperanto Mondo

Sallstrasse 124, Hannover(Germ).

Internacia monata revuo por literaturo, tekniko kaj sciencoj. Ĉiu numero 16-32 paĝa, grandformata.

#### JARABONO :

Simpla eldono : 1 u.s.a. Dol. - 4 germ. mk.  
Luksa eldono : 2 u.s.a. Dol. - 8 germ. mk.

Specialaj prezoj per revendantoj !

Mendu senpage specimenan numeron.

**Abonu ! Varbu !**

# BULTENO

MONATA EL DONO  
DE LA

ANTVERPENIA PROPAGANDA  
E  
PORSPERANTO KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHE STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SMIEDER 55 STRAAT 51

3<sup>A</sup> JARO

N<sup>o</sup> 9

SEPTEMBRO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
0.15 Svfr.

## INTER NI.\*

Kiel ĉiu movado, tiel ankaŭ la esperanta, paralele al la senĉesa evoluo konstante ricevas ĉiam pli kaj pli novajn taskojn, aŭ pli vere, la ĝeneralaj taskoj, kiuj ĝi havis en sia komenco, detaliĝas kaj specialiĝas.

Bedaŭrinde la esperantistoj — kaj precipe tiuj kiuj gvidas la movadon kaj ĝiajn erojn — ne ĉiam sekvas tiun evoluon de la taskoj kaj ne ĉiam konformigas sian agadon al la postuloj de la travivata momento.

Pro tio, multa energio kaj laboro estas dediĉataj al vanaj klopodoj.

Organizita movado — tio ĉi signifas: per minimumo da fortostreĉo ricevi maksimumon da rezultoj. La ideo pri organizo estas ĉiam ligita kun la ideo pri racia kaj ekonomia uzo de la fortoj.

Kiun taskon ni povas meti al la esperantista movado nun — en la momento, kiam

\* Ĉar la artikolo pritraktas faktojn, kiujn ni ankaŭ konstatas en Antwerpen, ni permesas al ni represi ĝin, kiel ĝi aperis en "Bulgara Esperantisto" de marto 1926.

ĝi jam forpasis la malfacilegan unuan periodon de populariĝo de sia propra nomo, kiam ĝi kreis sian adeptaron, kiam ĝi sukcesis pli-malpli trudi al la mondo la konscion kaj la rekonon de sia ekzisto, kiam fine en certaj medioj oni havas eĉ pli grandan iluzion pri la stato de la movado ol ĝi eble estas?

De multaj flankoj oni respondos senhezite: propagandi, senĉese propagandi, ĉiam kaj ĉie propagandi.

Propagandi — tio estas varbi ĉiam novajn adeptojn kaj pli multigi la esperantistaron. — enirigi ĉiam pli multajn homojn en la esperantistan vivon.

Sed ĉu tiu ĉi vivo mem estas jam definitive kreita, formita? Ĉu por tiuj homoj, kiujn oni klopodas varbi, ekzistas jam preta, riĉa diversflanka vivo per Esperanto?

Mi respondos: ankoraŭ ne tute; ni ankoraŭ devas labori por krei tian vivon.

Kaj jen, tiu ĉi tasko estas en la nuna momento senkompare pli grava en nia movado, ol propagandi.

Sencele estas instrui Esperanton al persono, kiu post la kurso ne vivos esperante.

La tuta klopodo estas nur vane uzita laboro. Tio ĉi estas plene kontraŭo al la fundamenta ideo pri organizo kiel ekonomia uzo de fortoj por atingi definitan celon.

Sed kelkaj opinias, ke sufiĉe estas, se la kursanoj eniras post la lernado en la kurso la organizaĵon. Se la organizaĵo efektive prezentus esperantistan vivon. — jes, tiu opinio estus pravigata. Sed kion ni donas en la organizaĵo ordinare al la freŝajesperantistoj? Ni kvazaŭ penas konvinki ilin, ke ili devas preni parton en la formalaj organizaj demandoj — ja ili pagas per sia kotizaĵo sian rajton en tiu rilato! — kaj ĉe tio, por forigi ilian naturan kaj pravan ĝenetecon partopreni aktive en la vivo de organizaĵo, kie ili ankoraŭ estas novicoj — ni penas konvinki ilin, ke la cenzo pri posedo de la lingvo estas duaranga laŭ graveco . . .

Ĝis tia paradokso, malfeliĉe, ni jam venis en Sofio — eble eĉ en multaj lokoj de nia lando. (Ankaŭ en Antwerpen. — Noto de Red.)

Oni ĝojas pro la "amasa movado", ne rimarkante la negativan flankon de tiu movado.

Kaj jen, kontraŭ tiuj komprenoj pri la movado kaj kontraŭ tiuj vokoj pri senĉesa vasta propagando, vokoj venantaj ordinare de pli novaj kaj pli malpaciencaj esperantistoj, el Genevo venas al ni serioza, aŭtoritata direktanta voko: „Ne kuru tro rapide, por ke la spaco inter la famo kaj la fakto ne fariĝu distanco... Ni devas varbi per kursoj ne kun 50 lernantoj en komenco kaj 5 en fino, sed seriozaj, ĝisfundaj, kun 10 personoj, eĉ kun 6 aŭ 7 de l'unua ĝis la lasta leciono, ke ĉiuj povu lerni per ekzerco kaj parolo”.

Certe, tiun vokon la trorapidemaj kaj malpaciencaj propaganduloj, revantaj pri grandamasa movado kun bruo, renkontos kun konfuzo. Ili nekomprenas ĝin.

Kaj tamen — ĝi estas la sole obeinda konsilo. Ĝi respondas al la neceso de la nuna momento, kaj precipe en nia lando.

Antaŭ ni aperas la grava demando: al kio direkti niajn klopodojn — al kvanta, aŭ al kvalita progreso?

Kompreneble, la kvanto, ligita kun la

kvalito estas granda forto kaj estos de ĉiuj dezirata. Sed, kiam ekzistas nur la kvanto kaj por ĝi oni oferas la kvaliton — tiam la kvanto jam povas esti rekte malutila. Ĝi jam signos la malforton de la movado.

Tiun penson certe ankaŭ ne povos asimili la malpaciencaj propaganduloj.

Kaj ja frapantaj ekzemploj ne mankas — ili estas antaŭ niaj okuloj.

Ĉu vi scias ke dum la lastaj 5 jaroj ne malpli ol 500 personoj estas vizitintaj la esperantaj kursojn en Sofia? Kie estas nun la esperantista vivo, rezulte de tiu laboro? Ĉu ni ne havus nun multe pli grandan forton, se post unu kurso ni dediĉus nian plenan atenton al la tasko finesperantigi la novajn, freŝajn samideanojn, kreante por ili veran esperantistan vivon? — Sed, ni ĉiam post la fino de ĉiu kurso pensis jam pri novaj varboj de novaj personoj — por plimultiigi la amason de la duonesperantistoj. Kaj por vivi esperantiste — al ni neniam restis sufiĉa tempo.

Ĉu nun oni povus trovi en niaj organizaĵoj esperantistan vivon?

(daŭrigas)

## En Antwerpen venis.... nova sento!

Iam fervora samideano el malproksima lando, dezirante konatiĝi kun la esperantistoj en Antwerpen, petis de la *plej fervora esperantisto* (?) el tiu ĉi urbo: "Kie estas "Hôtel Cecil", la kunvenejo de "La Rekta Vojo"? — "Tion vi ne devas scii," estis la respondo, "vi ne bezonas iri tien!"

Kion vi do faris, ho, Rekta Vojo, por ke oni tiel abomenas vin? Ĉu eble estas ĉar vi sekvas la rektan vojon al la plej certa fina venko de Esperanto kaj ne blinde sekvas la *plej fervoran esperantiston* (?) el Antwerpen sur la rekta vojo al persono vana gloro?

## Patrino Mia.

Amiketoj, por vi kantos  
Mi pri ĉarma la patrin';  
Pri l'plej koramata mia,  
Ĉar ŝi ankaŭ amas min.



### Rekantajo.

Patrineto, karulino,  
Plej mi amas vin en mond'.  
Ĉiam bildo plej ŝatata  
Restos vi en nia rond'!

Kison premas ŝi sur buŝo  
Antaŭ ĉia taglabor';  
Kaj rideto ĉe l'ekdormo  
Estas mia kortrezor'.

Kiam sur ĝenu' mi ludas,  
Dolĉe plaĉas la kares';  
Kaj per ĝi foriĝas baldaŭ  
De sufero la impres'.

Laŭ la teksto kaj melodio de  
A. VERSCHUEREN  
tradukis: JUUL KARNAS.

### Ekskurso al Hemixem.

La 21a de julio estas signita per ruĝaj literoj en la almanako de la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato kaj tio signifas speciala festotago. La tradicio jam postulas ke tiun tagon ni ekskursu al Hemixem kaj tie viziti la familion Keveriĵn. Kvankam pluvis, dudek-kvar gesamideanoj el Antwerpea veturis al la industria vilaĝo ĉu per aŭtobuso ĉu per vaportramo. La vojo, kiu kondukas de la vaportrama haltejo al Hemixem, nun ne multe plaĉis al la luksemaj samideanoj, ĉar je ĉiu paŝo ili riskis makuli per koto la belajn ŝuojn kaj la delikatajn ŝtrumpojn.

Malgraŭ ĉio ĉiuj alvenis kun la plej gaja humoro. Ĉe la fasado flirtis la standardo de A.P.P.K.

Gesinjoroj Keveriĵn kaj ilia filino Lucie afable deziris al ni bonvenon kaj tuj regis en la modesta domo la plej gaja interbabilado kaj ŝercado. Dum oni rememoris okazintaĵoj el antaŭaj vizitoj, estis servata glaso da bona ruĝa vino, kiun oni eltrinkis je la sano de la bonkoraj gegastigantoj.

Tuj ekaŭdiĝas de fortopiano kaj violono nekontraŭstareblaj sonoj de dancmuziko. Baldaŭ la antaŭĉambro ŝanĝiĝas en dancejo, sed por ne difekti la tapiŝon la dancemuloj

demetis siajn ŝuojn kaj metis ilin en la koridoron.

"Venu, S-ro Janssens fatografos nin! Rapidu, ne plu pluvas; estas fervora momento! Iru en la ĝardenon!"

La dancado ĉesas kaj ĉiu prenas siajn ŝuojn por almeti ilin. "Mi ne plu povas enirigi mian piedon en mian ŝuon", diras samideano, "eble ĝi ŝvelis pro la marŝado." — "Ne estas tiu-ĉi mia ŝuo, estas ŝuo de sinjoro," diras fraŭlino. "Kie estas miaj ŝuoj?" diras tria. — "Rapidu do! venu! baldaŭ estos tro malfrue por fotografi."

"Kio do okazis?" Dum en la ĉambro oni tute gaje kaj nenion suspektante dancadis, iu ŝercemulo estis malordiganta la ŝuojn, tiamaniere ke flanke dekstra ŝuo de iu persono troviĝas maldekstra de alia.

(Fino en venonta bulteno)

### La Ekskurso al Vlissingen.

Brila vetero antaŭe mendita...

Sabatvespere post la kunveno de "La Rekta Vojo" mi iris hejmen dum pluvegis. Kolere mi pristudis la barometron en mia koridoro: "Pluvon kaj venton" ĝi antaŭdiris. Pli kolere mi frapetis kontraŭ la vitro: la montrilo pli malleviĝis. Murmurante malbenon mi eniris la dormoĉambron.

Dimanĉmatene. Dika, griza, nubokovrita ĉielo. La blanka vaporŝipo "Waesland", la multkolora homamaso, la Esperantoflago, kiun mi malrapide kaj soĉene suprentiris ĝis la mastpinto, ĉio strange kantrastis kun la aero nebula.

Precize je la 8a nia ŝipo foriris de la riverbordo; la muziko ludis; gejunuloj jam ĉarlestonadis; la esperantistaro de diversaj grupoj kaj lokoj denove interkonatiĝis; la verda flago vere gaje flirtadis super la kapoj.... Mi estas devigata konfesi ke sen suno ankaŭ povas sukcesi ekskurso. "Se nur ne ekpluvu!" mi sopiris. Veninte apud la Rojerskluzo subite la nuboj disŝiriĝis; pala suno aperis inter ili. Dekoj da manoj etendiĝis por montri tiun maloftan fenomenon. Ju pli ni malproksimiĝis de Antverpeno, des pli la suno heliĝis, des pli la nuboj malaperis. Fine: purblua ĉielo,

hela, varma suno : la antaŭe mendita brila vetero estis kaj restis.

Dum 5 horoj ni ĝuadis la belan riveron : oni kantis, trinkis, dancis, ridegis, salutis laŭte la ŝipanaroj de la preterpasantaj ŝipoj ; unu eĉ antaŭdiris la estonton per ludkartoj. unuvorte : ĉiuj amuzegadis. Mi pensis pri la nuna stato de mia barometro....

Alveninte en Vlissingen ni disiris. Grupoj formiĝis kiuj vizitis la urbon, la marbordon, la dunojn. Kelkaj inter kiuj ankaŭ mi, preferis freŝan banon en la sala akvo. La tempo kvazaŭ flugis for. Iom post iom la ekskursantoj reiris al la ŝipo, kiu foriris de la kajo je la 5.30a h., dum multe da enloĝantoj nin gaje adiaŭis. Laŭ la programo ni devos alveni en Antverpeno je la 9a h. Sed la ŝipveturado dependas de multaj cirkonstancoj.

Ordinare la rapideco de vaporŝipo dependas de la povo de la maŝinoj, la kvanto kaj kvalito de la karboj, k.t.p. Sed la rapideco de revenanta ekskursŝipo dependas de la kvanto de la bareloj da biero eltrinkotaj ! Ju pli da biero despli malrapide la veturado. Jen la kaŭzo kial ni nur albordiĝis je la 10.15. Tute kontentaj, dankaj por ĉio, kion ni ĝuadis. Diversaj Rektvojoj vizitis poste la kafejon " La Ruĝa Ĉapelo " por eltrinki tutlastan ĝlaseton antaŭ ol disiri. Kaj tie ĉi mi trovis okazon por admiri homparon kiu, kvankam ĉarlestonadinte jam la tutan tagon ne povis kontraŭstari la sonojn de " jazbando " kaj denove ĉarlestonadis !

Ni tutkore dankas la gasteman societon " Vondel " kiu al ni ebligis je favorprezoj partopreni en tia belega vojaĝo.

La pasintan jaron ni estis 100 ope. Nun preskaŭ 200 ope. Kaj proksiman jaron ? Karaj gelegantoj, ĉu vi partoprenos ?

Brila vetero k.t.p....

A. LODEMA.

### NASKIĜO.

Al Ge-roj Frans De Backer - De Wieuw, Wilrijck-Antwerpen, naskiĝis fileto Walter. Al la feliĉaj gesamideanoj A.P.P.K. prezentas siajn plej korajn bondezirojn.

### NEKROLOGIO.

Nia bone konata samideano, S-ro D-ro W. Van der Biest, kiu depost la milito loĝas en London, havas la grandan malfeliĉon perdi sian estimatan edzinon post mallonga malsano.

A.P.P.K. prezentas al la eminenta samideano la esprimon de sia sincera kunsento.

### BIBLIOGRAFIO.

International Language, junio. — La Revuo Orienta, junio. — Oomoto, junio. — La Unuigita Tuthomaro, majo, junio. Esperanto-Mondo, julio. — Le Sincériste, julio. — Licht en Waarheid, junio. — Bulteno de Internacia Scienca Asocio Esperantista, julio. — Roia, junio. — Arbeiter Illustrierte Zeitung aller Länden (A-J-Z.), 29-6-27. — Verda Stelo, julio.

### MONDONACIOJ POR LA SUBTENO DE LA BULTENO.

	Antaŭa listo	142.55
S-ro Herkules	fr.	1.—
Bona Sinjorino		1.—
Bonega Sinjoro		5.—
Joĉjo		1.—
Kartolegado de J. F.		7.50
Je la memoro de mia frato		5.—
		<hr/>
		fr. 163.05

## Esperanto Mondo

Sallstrasse 124, Hannover(Germ).

Internacia monata revuo por literaturo, tekniko kaj sciencoj. Ĉiu numero 16-32 paĝa, grandformata.

### JARABONO :

Simpla eldono : 1 u.s.a. Dol. - 4 germ. mk.

Luksa eldono : 2 u.s.a. Dol. - 8 germ. mk.

Specialaj prezoj por revendantoj !

Mendu senpage specimenan numeron.

**Abonu ! Varbu !**

# BULTENO

MONATA ELDONO  
DE LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA  
POR ESPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDER 55 STRAAT 51

3<sup>a</sup> JARO

N<sup>o</sup> 10

OKTOBRO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
" 0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
" 0.15 Svfr.

## INTER NI.

(daŭrigo)

Se iu nova esperantisto dezirus trovi lokon, kie li aŭdos esperantan konversacion, kie li renkontos homojn, parolantaj pri la aferoj, kiuj interesas la tutmondan esperantistaron, se li dezirus trovi sin en vere esperantista medio — ĉu tiun lokon li trovos en la organizaĵoj esperantistaj de nia urbo?

Certe ne.

Kie do estas la fruktoj de nia ĝisnuna laborado?

Nun al niaj organizaĵoj donas fizionomion la duonesperantistoj: ili donas la tonon en niaj kunvenoj. Por altri amason, oni jam oferis Esperanton — oni elĵetis la esperantan parolon el la esperantistaj kunvenoj. Oni enkondukis iajn bulgarlingvajn referaĵojn. Prezentu nun al vi, ke serioza homo ellernis Esperanton, al li ekplaĉis la aspekto pri bela samideana vivo, kaj li iras al esperantista kunveno, por trovi ĝin. Li venas en la kunvenejon de la esperantistoj. Kion li trovas? — Iu homo legas en bulgara

lingvo pri ia temo, kiu havas nenion komunan kun Esperanto kaj kun la esperantista vivo. — Kaj li ekpensas: kie do mi estas? Kie mi devos serĉi esperantistan vivon, esperantistajn interesojn, se ne ĉi tie?

Kaj prezentu al vi, ke fremdlanda esperantisto venus Sofion kaj dezirus surprize viziti kunvenon de la lokaj samideanoj. Kion li trovos tie?

Tempo estas jam, ke ni iom flankenlasu la eksteran propagandon kaj ekpensu pli serioze pri la kreo kaj organizo de la esperantista vivo. Tia vivo estas krebbla nur, se ekzistus bonaj, perfektaj esperantistoj, kaj do la unua ŝtupo al tiu vivo estas labori por perfektigo de la nunaj duonesperantistoj.

Kaj oni devas scii: En la nunu tempo la organizita bone, formita esperantista vivo povas esti multe pli efika propagandilo ol multaj kaj multaj teorioj pri la internacia lingvo.

Ada

## La turismo kaj Esperanto.

Lastatempe turistaj eldonoj kaj gvidfolioj en Esperanto aperis pri Brno (Ĉeĥoslovakio), Cheltenham-Spa (Anglujo), Dordrecht (Nederlando), Dresden (Germanujo), Torquay (Anglujo), kie la Turismaj Officejoj uzas tiun ĉi lingvon por diskonigi al la eksterlando la allogaĵojn de tiuj urboj.

## 40 jaroj de Esperanto.

La naskiĝ-urbo de la aŭtoro de Esp., Bialystok, en Polujo, samkiel div. aliaj urboj en eksterlando, jam baptis stratojn je nomo de D-ro Zamenhof aŭ de Esperanto. La ban-urbo Zoppot (proksimo de Danzig) ĵus nomis straton kaj placon en kvartalo, tre frekventita per eksterlandanoj, laŭ Esperanto. Sur la "Placo de Esperanto" la partoprenintoj de l'XIXa Universala Kongreso de Esperanto de Danzig laŭ invito de la Konsilantaro de l'Urbo de Zoppot plantis kverkon je moro de la 40a datreveno de l'apero de la internacia helplingvo Esperanto.

## Oficiala apogo de E. en Rumanujo

Per oficiala cirkulero (Dir. III. Serv. E. Nro. 46271.927.12.4.) la ministro de la publika instruado de Rumanujo rekomendis al la direktoroj de l'meza instruado donisian tutan helpon al la organizo de kursoj de Esperanto por lernejoj samkiel por la publiko.

## La hoteloj kaj Esperanto.

Antaŭ ĉio en la hotela servo Esperanto jam faras praktikajn servojn. En Budapest pluraj hoteloj komencis afiŝi en siaj ĉambroj avizojn kaj regularon kun traduko en Esp.

Pro la Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Danzig dum tiu ĉi jaro, la hoteloj de tiu ĉi urbo faris same.

## Urbaj Vesperkursoj.

La enskriboj por la urbaj vesperkursoj (1a kaj 2a jaroj) okazos :  
por sinjoroj en la urbaj lernejoj de :

Van Maerlantstraat

Louizastraat

Pierenbergstraat

por sinjorinoj kaj fraŭlinoj en la urbaj lernejoj de :

Eikenstraat

Lange Leemstraat

Speerstraat

Subtenu la oficialajn kursojn, nur ili donas bonan rezultaton. Instigu viajn konatulojn ĉeesti ilin!

## El letero de eksterlanda samideano, kiu vizitis Antverpenon.

"... Sincere mi esperas ke la iom sentebla malpaco, kiu regas nun, malaperu per kunlaborado de ĉiuj esperantistoj por sukcesigo de la venonta kongreso en Antwerpen".

Ni dankas la afablan samideanon pro liaj belaj vortoj sed pli kaj pli ni antaŭvidas ke tiu kunlaboro neniam okazos. Jam dum tri jaroj A.P.P.K. provis atingi la kunlaboron de ĉiuj esperantistoj en Antwerpen ne nur por sukcesigi la venontan kongreson sed la tutan esperanto-movadon. Sed ĉiuj niaj pensoj estas vanaj kaj restos vanaj pro la obstineco de solreganto.

## Centra Esperanto Kurso.

Kelkfoje nia Komitato ricevis de personoj, kiuj tute ne povas ĉeesti la urbajn vesperkursojn, petojn por rekomendi al ili bonan lernolibron per kiu ili povas lerni Esperanton. Por flandroj ni kutime rekomendis "Het Esperanto in 20 lessen, de "Blok", ĉar per helpo de la "Sleutel tot de oefeningen" la lernantoj povas mem kontroli siajn taskojn; por francoj tre utilas "Cours pratique d'Espéranto". Por kontentigi la multnombrajn lernemulojn el la flandra parto de nia lando A.P.P.K., interkonsente kun la "Centrale Commissie tot het organiseren van Esperanto-Cursussen" el Nijmegen (Nederlando), decidis eldoni, okaze de la 40a jubileo de Esperanto, *popularan jubilean kurson korespondan*. La pasintan jaron la „Centrale Esperanto Commissie" eldonis sian unuan skriban kurson de Esperanto. Evidentiĝis ke tia kurso

plenigas veran bezonon. Miloj sekvis la tutan kurson. Je la nuna momento pli ol 1200 personoj enskribiĝis por la nova kurso kiu komencos ĉirkaŭ la 15an de oktobro kaj kiu daŭros 6 monatojn. Ĉiun semajnon aperos unu leciono de almenaŭ 8 paĝoj. (La unua leciono enhavas 12 paĝojn grandformatajn). La tradukoj de la ekzercoj sekvas ĉiam en la sekvonta leciono. Unufoje ĉiunmonate estos ripetekzerco, kiun, aldonante poŝtmarkon da 0.50 fr., ricevas korektita. La tuta kurso kostas, sen pliaj elspecoj, nur 20 frankojn. La pago okazos antaŭe kun la enskribo per poŝtmandato. Oni povas enskribiĝi sin de nun ĉe S-ro Jef De Waegenaere, Rotterdamstraat, 91, Antwerpen.

### Lauvola enkonduko de Esp. en la pli altajn kaj mezajn lernejojn en la Saarteritorio.

(Traduko)

Registara Komisiono de la Saarteritorio  
Sekcio por Kulto kaj Instruado  
J. Nr 11 990/27

Saarbrücken, 18 julio 1927

Ni konsentas, ke Esperanto estu enkondukata kiel laŭvola instrua fako en la pli altajn kaj mezajn lernejojn. Kie trovas sin kapablaj instruistoj, tie la enkonduko povas okazi jam dum la nuna instrua jaro. Rekomendinda estos dumjara kurso enhavanta du lecionojn posemajne en iu meza klaso (ekz. en la malsupra dua klaso (deka lerneja jaro). Kurso pli malfrue estas intencata por instruistoj.

Subskribo.

Al S-roj direktoroj de la pli altaj lernejoj,  
S-roj rektoroj de la mezaj lernejoj kaj al  
S-roj prezidantoj de la lernejoj reprezentantaraj.

### EDZIĜO.

La 24an de septembro S-ano Jos. Cats, sekretario de la Esperantistoj Diamantistoj kaj dua sekretario de A.P.P.K. edziĝis kun F-ino Adeline Pierard.

Al la juna paro ni sendas niajn plej korajn gratulojn kaj bondezirojn.

### Esperanto progresas.

El "Le Matin". Traduko.

Oni demandas daktilon en oficejo de asekurado, spec. kun Oriento, fr., fl., germ., angl., kaj konoj de esperanto skribi.

### GRUPA VIVO.

#### La Rekta Vojo.

Monata Programo de la Sabataj kunvenoj

*Oktobro 1an* : Ĝenerala kunveno. Legado de s-ro J. Karnas : La vivo de Zamenhof.

*Oktobro 8an* : Parolado de s-ro Lodema : Promenado tra Amsterdamo (kun lumbildoj)

*Oktobro 15* : S-ro J. Jacobs : La Pozicio de A.P.P.K. rilate al la Antverpena Esperanta Movado.

*Oktobro 22an* : Komenca Ballo en Café des Billards. (Kartoj estas haveblaj ĉe ĉiuj R. V. anoj po 3.00 fr.)

*Oktobro 29an* : Parolado de s-ro J. De Waegenaere : La Vivo de Rubens.

*Novembro 5an* : S-ro Janssens : La Fabriko de Philips-elektraj lampoj.

*Novembro 12an* : S-ro Fr. Roelants : Post komunista Parolado !

### BALLO.

Sabaton, la 22an de oktobro 1927a je la 8a vespere, en la salono de la "Grand Café des Billards" Breydelstraat, MALFERMA BALLO. — Surprizoj. — Ĉiuj gesamideanoj estas invitataj. La enirprezo estas 3.— fr.

### Hoboken'aj Esperantistoj.

Fondiĝis en Hoboken, la 22an de julio, nova neŭtrala grupo, "Hoboken'aj Esperantistoj". Tiu juna grupo jam kalkulas 18 ordinarajn membrojn kaj 6 subtenantajn. La sidejo estas en Wielrijdersstraat, 36, Hoboken. La komitato konsistas el :

S-roj J. Van Tiggel, prezidanto ;

Ben. Somers, vic. prezidanto ;

Lode Toen, sekretario, Wielrijdersstraat, 9, Hoboken ;

Maur. Van Tiggel, kasisto.

"Hoboken'aj Esperantistoj" jam aliĝis al A.P.P.K.

Tutkore ni deziras bonvenon al niaj Hoboken'aj amikoj kaj deziras al ili longan fruktodonan vivon.

BIBLIOGRAFIO.

La Revuo Orienta, monata organo de Japana Esperanto-Instituto, Tokio, Japanujo, julio. — La Suda Kruco, oficiala organo de la Aŭstralazio Esperanto-Asocio, Melbourne, Aŭstralio, junio, julio, aŭgusto. — Kristana Revuo, dumonata bulteno, London, Anglujo, n-ro 1, aŭgusto. — Svenska Esperanto-Tidningen "La Espero", Stockholm, Svedujo, junio, julio. — La Unuigita Tuthomaro, Hamburg, Germanujo, julio, aŭgusto. — International Language, London, Anglujo, aŭgusto, septembro. — Argentino Esperantisto, Buenos-Aires, Argentino, junio, julio. — Vegetarano, Hamburg, Germanujo, julio. — Libera Laboristo Mannheim, Germanujo, julio, aŭgusto. — Cosmoglotta, Mauer bei Wien, Aŭstrio, septembro, oktobro. — Roia, Waverly, W. Va., U.S.A., Talam-Talaq Brem, julio, aŭgusto. — El Heraldo Naturista, Mexico, ano VI, n-ro 11. — Licht en Waarheid, Antwerpen, België, Augustus. — Le Sincériste, Waltwilder, Belgique, août, septembre. — Le Matérialiste, Laeken-Bruxelles, Belgique juillet.

Heroldo de Esperanto, Horrem bei Köln Germanujo, n-oj 30, 31, 32, 33, 34, 35, 36.

La Edukado de la Infanoj pri Pacaj Principoj, E. Madeleine Wood, aldono al "La Suda Kruco". — Gvidfolio tra Zutphen, eldonita sub la aŭspicioj de "Zutphen Vooruit" kaj la turisma servo de U.E.A. — Gvidlibreto tra la distrikto Schönhengst, la plej granda germana lingva insulo en Ĉeĥoslovakio, eldonita sub aŭspicioj de la germ. regiona popolkleriga asocio, kun helpo de D-ro Alfred Grimm, kunmetita kaj esperantigita de Erich Koblichke, instruisto, Landskron, prezo Kĉ. 1.—

Estas tre interesa, ilustrita gvidlibreto en tre bona esperanto; tamen ne plaĉas al ni la esprimo "kelkiun iaman" anstataŭ simple "iaman" aŭ "ian iaman"; "kvareĝe" anstataŭ "kvarangule" ne estas rekomendinda vorto.

Gvidlibreto por Japanlando, 37 ilustraĵoj, 9 landkartoj, tradukita de la Redakcio de

Japana Esperanto-Instituto, eldonita de Japana Ministrejo de Ŝtat-fervojoj, Tokio, Japanujo.

Tiu ĉi 102 paĝa libro formas vere plenan gvidlibron por la turisto en Japanujo. Ĝi enhavas krom la geografion de la lando detalan priskribon de la vidindaĵoj de la lando kaj de la ĉefaj vizitindaj kaj interesaj lokoj. La parto "Informoj por Vizitontoj en Japanlando" enhavas tre utilajn informojn por faciligi la vojaĝadon al eksterlandano. Entute ĝi estas tre kompleta kaj tre oportuna. La ilustraĵoj estas tre bele prizorgitaj kaj zorge kolektitaj. La lingvo uzita estas vere modela.

MONDONACOJ POR LA SUBTENADO DE LA BULTENO.

	Antaŭa listo 163.05
Por la propaganda kaso de A.P.P.K.,	
s-ro J. Halstead, Royston (Anglujo)	8.—
Avarulo pagas duoble	2.—
Je la memoro de mia frato	5.—
Por 3 bultenoj	2.—
Ano de "La Rekta Vojo"	2.—
Por la sukceso de la oficialaj urbaj kursoj	3.—
Por ke la promenanta Judo ne plu promenadu	1.—
P. P.	5.—
	fr. 191.05

PRAKTIKA LERNOLIBRO.

Por memstudado aŭ en kursoj uzu la plej praktikan kaj agrablan lernolibron ilustriton: **Cours pratique d'Espéranto**, eldonita de Librairie centrale Esperantiste, Paris, kun antaŭparolo de Sro Th. Cart. — 192 paĝoj. — Prezo: 6 Fr.fr. krom sendkostoj.

Deponejo por Belgujo: A. P. P. K., Rotterdamstraat, 91, Antwerpen. Speciala rabato por grupoj.

ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ.

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn ilustritaj poŝtkartojn, eldonitajn de A. P. P. K. (kolekto Nels).

Aperis 2 malsamaj serioj da 10 kartoj.

Prezo po serio: 1 Bfr.

Haveblaj: A. P. P. K., Groote Beerstraat, Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva: flandra, Esperanta, franca; do ankaŭ uzeblaj de neesperantistoj.

# BULTENO

MONATA ELDONO  
DE LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA  
POR ESPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO:  
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SNIEDER 55 TRAAAT 51

3<sup>a</sup> JARO

N<sup>o</sup> 11

NOVEMBRO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
0.15 Svfr.

## Malutila Propagando.

En loka ĵurnalo ni legis: "En oktobro s-ro E. Guerra, el Tampico, Meksiko, vizitos nian urbon. Tiu, kiu deziras kompreni s-ron Guerra, sekvu la novan kurson kiu komenciĝos la 20an de septembro." Ĉu tia aserto estas digno de nia afero? Ĉu per tia sensencaĵo oni povas allogi la nesciantan publikon? Ni simple nomas tion trompado. Supozante ke s-ro Guerra venos je la fino de la monato oktobro la lernantojn estos havintaj ses lecionojn. Tiu tempo tute ne povas ebligi mezinstruitan personon kompreni la parolatan lingvon. En ses horoj oni certe povas klarigi la tutan esperantan gramatikon; eĉ malpli da tempo sufiĉas. Sed ĉu tio pravas la superecon, la facilan lerneblecon de Esperanto? Tute ne! Oni povas fari tion por ĉiuj lingvoj. Ĉu por konigi la ĝeneralajn gramatikajn principojn de iu lingvo oni bezonas pli da tempo ol por konigi tiujn de Esperanto? Ne, kontraŭe! Pro la absoluta neceso klarigi la sistemon de vortfarado en Esperanto oni

bezonas pli da tempo. Nur post plena asimilado de tiu sistemo, kaj tio postulas multe da tempo, Esperanto iĝas facile komprenebla. Laŭ ni la lernado de lingvo ne konsistas en la ekkono de multaj gramatikaj reguloj sed en la kono de multaj vortoj. Nur kiam oni deziras koni la plej grandajn subtilaĵojn de iu lingvo multaj malfacilaj reguletoj aperas. Sed ĉu tiu aŭkaŭ ne estas ĝis iu grado en Esperanto? Ĉu ankaŭ ne ekzistas "Commentaire sur la grammaire de l'Espéranto". — "Lingvaj Respondoj", k.t.p.? Kial?

Ĉu per tio ĉi ni volas diri ke Esperanto ne estas ellernebla ol iu ajn lingvo? Ne, tute ne! Esperanto estas vere pli facila ol alia lingvo. Sed diri ke ses horoj aŭ dekkvin lecionoj sufiĉas estas malvera. Nur stultuloj lasas sin kapti per tia aserto.

Antaŭ nelonge lingva profesoro diris al mi: "Sed, diru al mi malkaŝe, ĉu Esperanto estas vere tiel facila kiel oni tion asertas; ĉu oni povas ĝin bone koni post kelkaj horoj?" Mi respondis: "Ne, sinjoro! Por ke vi estu kapabla uzi ĝin skribe kaj

buŝe, vi bezonas multe da ekzercado ; sed ĝi estas tamen pli facile lernebla ol iu ajn vivanta lingvo ; ĝis kia proporcio mi ne scias ; tio dependas de la instruiteco de la lernanto kaj de la ekzercado. " — " Tiu malkaŝa respondo plaĉas al mi ", respondis la profesoro. Kaj la sekvo estis ke li mendis la Korespondan Centran Esperanto Kurson eldonitan de A.P.P.K.

Kiam persono vere sentas la bezonon koni la internacian lingvon, li ne demandas, ĉu ĝi estas 2, 3, 4, 10 foje pli facila ol alia lingvo ; li nur deziras scii ĉu tiu lingvo estas al li utila, ĉu ĝi estas uzebla, ĉu ĝi estas parolebla kaj komprenebla ; ĉu ĝi estas la sama en la tuta mondo. Se vere internacia lingvo estas nuntempa necesajo, eĉ la malfacila lernebleco ne povus malhelpi ĝian progresadon. Tion ankaŭ skribis nia fama lingvisto, profesoro J. Vercoullie, kiu antaŭvidas la solvon de la problemo pri internacia lingvo jenmaniere : " La demando pri lingvo internacia estas lingva " struggle for life " (vivobatalo). Tiu kiu sukcesos venki la aliajn, estos la internacia lingvo, kiu ajn ĝi estu, kia ajn malfacila ĝi estu ! " Kaj li tute pravas. Oni ne lernos Esperanton ĉar ĝi estas facila, sed ĉar ĝi estas utila, necesa.

Ni deziras ke oni ĉesigu tiun malutilan propagandon. Ni konvinku la plenkreskulojn pri la utileco kaj granda valoro de Esperanto en la nuntempa socio kaj al juna generacio oni devige lernigu la internacian lingvon en la lernejoj.

J. B.

## La XXa Universala Kongreso de Esperanto.

Diversaj personoj el nia lando kaj el eksterlando petis de ni informojn pri la XXa universala kongreso de Esperanto, kiu devas okazi en Antwerpen. Ni bedaŭrinde sciigas al la gesamideanoj ke la Antverpena Poresperanto Propaganda Komitato nenion aŭdis aŭ eksciis pri tiu kongreso. Nur el la esperantaj ĵurnaloj ni scias ke en Danzig oni decidis okazigi ĝin en Antwerpen kaj ke ĝi okazos de la 3a ĝis la 11a de aŭgusto 1928. Tuj kiam ni ricevos inform-

ojn ni komunikos ilin en la " Bulteno ".  
A.P.P.K.

## Helplingvo.

Alla Internacia Federacio de Fakunuiĝoj oni konfidis la taskon esplori la eblecon de iu difinita lingvo aŭ helplingvo kiel ĉefa lingvo en la kongreso de la Internacia Federacio de Fakunuiĝoj povas entrepreni por iĝi superflua la tempoforrabanta kaj malfaciliga laboro en la internaciaj kongresoj de la laborista movado.

(Laŭ komuniko el " De Volksgazet ")

## Oficialaj urbaj vesperkursoj en Antwerpen.

Kun malĝojo ni konstatas ke la oficialaj urbaj vesperkursoj en Antwerpen pli kaj pli malprosperas. La kaŭzo estas facile trovebla: la persista, sistema kontraŭbatalado, sub la protektado kaj kun la aprobado de la landa kaj internacia esperanto organizaĵoj. Kvan-kam " Belga Esperantisto " de septembro 1927 mencias kiel ĝojigan fakton ke " Esperanto iom post ion disvastiĝadas en la lernejoj de aro da landoj, kaj eĉ en nia (4a grada Verviers, vesperkursoj Antverpeno)", neniam ni legis en tiu ĉi revuo la plej malgrandan instigon por varbi lernontojn por la oficialaj urbaj vesperkursoj en Antwerpen. J. C. certe ankoraŭ memoras la komitatan kunvenon de B.L.E. de 29.3.25 dum kiu la delegito de " Suda Lumo " faris la proponon ke estas nia devo *helpi* antaŭ ĉio al la sukcesigo de la kursoj oficiale organizitaj de komunumoj. Kial J. C. tiam ne subtenis tiun proponon. Ne, multe oni diskutis pri tio kaj precipe la " ĉefuloj " de B.L.E. kontraŭbatalis la proponon per ĉiaj sensecaj argumentoj.

Ni volonte volus scii kion opinias la esperantistaro pri la agado de prezidanto de nacia esperanto societo kaj estrarano de la internacia centra movado, kiu dum 6 jaroj ankoraŭ ne instigis unu personon ĉeesti la oficialajn kursojn ? Ni diras ke " tiu, kiu ne estas kun ni, estas kontraŭ ni ; tiu, kiu ne helpas, malhelpas ".

J. B.



## Centra Esperanto Kurso.

La unua okpaĝa leciono de tiu ĉi facila kaj interesiga kurso aperis la 17an de oktobro, kaj estis dissendita kune kun kvarpaĝa propaganda aldono, al la partoprenantoj. Tiu ĉi eldono bele aspektas, estas presita sur taŭga papero, kaj formas je la fino de la kurso, belegan pli ol du-cent paĝan lernolibron, tute verkitan por lerni Esperanton sen profesoro. La eldono de tiu ĉi kurso nur ebligis dank' al la estimata kunlaborado de niaj Holandaj samideanoj en Nijmegen. A.P.P.K. prenis sur sin la organizadon de la kurso en la tuta Flandra parto de nia lando. Ke ĝiaj klopodoj ne estis vanaj, pravas la akirita rezultato, kiu kontentigas eĉ la plej skeptikajn inter ni. Efektive, pli ol 450 partoprenantoj el 67 komunumoj enskribiĝis por sekvi nian "Centra Esperanto Kurso" dum la venonta vintro. El ĉiuj anguloj de la provincoj: Antverpeno, Limburgo, Brabando, Orienta kaj Okcidenta Flandrujo, la enskibiloj alfluis al la sekretario. Ni enpenetris en komunumojn, kie plitrupe la enloĝantoj eble neniam aŭdis eĉ paroli pri Esperanto, kaj kie nun oni fervore ekkomencos lerni nian helplingvon. Al ĉiuj tiuj novaj adeptoj ni kore deziras bonan sukceson kaj ni esperas renkonti ilin baldaŭ en la unuaj vicoj de la Poresperanto Propagandistoj. Ni ĝojas, ni estas kontentaj, ni estas eĉ iomete fieraj, ĉar tiu venko estas nur akirita dank' al la senlaca agado, al la grandskala propagando, kiun entreprenis nia ankoraŭ juna sed kuraĝa komitato. Ni daŭrigu, ĝeamikoj, ni neniam rigardu malantaŭen, nek dekstren, nek maldekstren, sed ĉiam antaŭen, ĉiam antaŭen. Ni semis, ni rikoltos.

La kurso daŭros ses monatojn, ĉiun semajnon unu leciono. Ĉiun monaton la kursanoj rajtas sendi ekzercon al la sekretario, je kondiĉo aldoni poŝtmarkon da 0.50 fr. por la respondo. La ekzerco estos korektata de niaj oficialaj esperanto ĝeinstruistoj, kaj resendata kun la necesaj korektadoj kaj notoj al la kursanoj. La tuta kurso, kiu restas la propraĵo de la kursano, kostas nur 20 fr.

Tiuj kiuj ankoraŭ ne enskribiĝis sin, hav-

as ĉiame okazon por fari tion, adresante sin al la sekretario: J. De Waegenare, Rotterdamstr. 91, Antwerpen.

## La teknika literaturo kaj Esp.

La "Radio-Journal", semajna organo de radiofonio kaj de l'radio-stacioj de Ĉeĥoslovakio entenas de post kelka tempo serion da artikoloj: "Babilado pri Radio" tradukitan el Esperanto, kiu tie servas kiel teknika peradilo.

## ATENTU !!

La Biervespero anoncanta de la REKTA VOJO okazos en "La Ruĝa Ĉapelo", Oude Koornmarkt, la 26an de Novembro. La membroj estas ĉiujninvitataj kaj nenion pagas.

Nemembroj pagos 5.— Fr.

Ĉiu estas petata sin antaŭe anonci al S-ro Lodema, Kalverstr., 12

## Konkurso.

La "Istituto Nazionale di Tecnica Editoriale" malfermas artan kaj literaturan konkurson por la disvastigo de Esp. en ĉiuj sociaj rondoj.

La konkurso enhavas jenajn fakojn:

1. Esperantaj reklambildoj;
2. Temoj por ilustritaj poŝtkartoj (kolorigitaj aŭ ne) pri jenaj fakoj:
  - a) Esperanto kaj ĉiuspecaj komunikiloj (aviado, fervojo, radio, kinematografio, k.t.p.);
  - b) Esp. kaj religioj, spiritaĵoj, movadoj, ktp
  - c) Esp. kaj polico;
  - d) Esp. kaj arto, scienco, literaturo;
  - e) Esp. kaj humoro;
  - f) Esp. kaj sporto;
3. Folkloro (moroj kaj kostumoj): foto-grafaĵoj, bildoj, k.t.p. kun klariga teksto
4. Kantetoj muzikaj aŭ muzikeblaj;
5. Humoraĵoj (skizoj, spritaĵoj, prozo, poezio, k.t.p.);
6. Teatro kaj kinomatografio: komedioj, tragedioj, k.t.p.

Kiu ajn povas partopreni iu ajn fakon de la konkurso, ankaŭ per pluraj verkoj. La verkoj devas esti **absolute originalaj kaj ne eldonitaj**. Komisiono de Artistoj kaj de Esperantistoj juĝos senpartie la verkojn, kaj la "Istituto Nazionale di Tecnica Editoriale" donas: unu ormedalon, tri arĝentmedalojn kaj ses aŭ pli bronz-

medalojn por la plej bonaj verkoj el ĉiu fako de la konkurso.

La supredirita Instituto rezervas al si ĉiujn rajtojn por la publikigo, la ekspozado kaj la disvastigo de la premiitaj verkoj.

La verkoj mem devos esti adresataj al **Rivista Cinema-Teatro, Via Principe Amedeo 165, Roma (23) Italia**, kaj devos alveni al tiu ĉi adreso ne poste la 31a de januaro 1928.

La nepremiitaj verkoj estos resendataj nur al tiuj, kiuj kunsendos la poŝtelspezojn

La direkto de la **Rivista Cinema-Teatro** (grandformata, luksa, ilustrita, internacia monata Revuo, kun itala-esperanta-franca-germana teksto) petas la tutmondajn gesamideanojn ke ili kunlaboru por la bona sukceso de la konkurso, disvastigante ĝin ankaŭ inter neesperantistaj artistoj; oni serĉas korespondantojn en iuj ajn landoj pri arto, literaturo, teatro, kinematografio k.t.p.

#### LA REKTA VOJO.

##### Monata Programo de la Sabataj kunvenoj

Novembro 5a: Parolado de S-ro Janssens.

La Fabrikejoj de Filips-elektraj lampaj.

Novembro 12a: Parolado de S-ro Roelants  
Post komunista Parolado.

Novembro 19a: Biervespero.

Novembro 26a: Interdisputadvespero. —  
Temo laŭ propono. Estrara kunveno.

Decembro 3a: Dua legado el "La Vivo de Zamenhof" — Kantolernado.

Decembro 10a: Ĝenerala kaj estrara kunveno.

#### RICEVITAJ PRESAĴOJ.

##### Gazetoj.

Informoj de Esperanto Asocio de Estonio aŭg. sept. — Heroldo de Esperanto, noj 37, 38, 39, 40. — La Verda Stelo, okt. — La Nova Tago, n-o 2, 3a jaro. — La Unuigita Tuthomaro, sept. okt. — Esperanto Junularo, julio. — La Interligilo de P.T.T., aŭg. sept. — Oomoto, aŭg. sept. — La Revuo Orienta, aŭg. sept. — Svenska Arbetar-Esperantisten, aŭg. sept. — Arbeiter Esperantisten, aprilo, majo. — Amerika Esper-

antisto, sept. — Le Sincériste, okt. — Le Matérialiste, sept. — Cosmoglotta, julio. aŭg. — Bulteno de I.S.A.E., sept.

##### Libroj kaj Broŝuroj.

ENKONDUKILO en la fundamentajn regulojn de la mondlingvo Esperanto; eld.: Esp. Junularo. A. Neupert, Wedelstr. 17, Leipzig, N. 23, Germanujo. 32 p. Prezo ne montrita.

LITERATURA INFORMILO, eld.: Esperanto fako ĉe la eidonejo Ferd. Hirt & Sohn, Leipzig, Germanujo. No 4. Somero 1927. 12 p. Senpaga.

Gvidfolio tra PADOVA, eld. de Nacia Estado por Turismo sub la aŭspicoj de Turisma Servo de U.E.A.

Gvidlibreto de WIESBADEN (Germanujo) 18 paĝa, bele ilustrita, sur luksa papero Senpage havebla je poŝtkartmendo ĉe la Urba Oficejo por Trafiko (Städtisches Verkehrsbüro) Wiesbaden.

#### ESPERANTO INSIGNO.

Verda stelo sur blanka rondo (17 mm.) buton-, broĉ- aŭ pendaĵformataj je 2.50 Bfr. La plej bela, la plej malkara! Havebla ĉe ĉiuj anoj de A.P.P.K.

Centra deponejo: Kalversstraat, 12 Antwerpen.

#### ILUSTRITAJ POŝTKARTOJ.

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn ilustritajn poŝtkartojn, eldonitajn de A.P.P.K. (Kolekto Nels).

Aperis du malsamaj serioj da 10 kartoj.

Prezo po serio: 1.50 Bfr.

Haveblaj A.P.P.K., Groote Beerstraat, 7 Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva: flandra, Esperanta, franca; do ankaŭ uzablaj de neesperantistoj.

#### BELGAJ KARBOJ

Por via vintroprovizo petu prezojn ĉe Agento de la "Belgische Kolenhandel" J. Bovoy, Minderbroedersruif 64, Antwerpeno.

Membro de A.P.P.K.

# BULTENO

MONATA ELDONO  
DE LA

ANTVERPENAJ PROPAGANDA  
ESPERANTO  
KOMITATO

REDAKTEJO: <sup>Gen. K.M.H.</sup>  
BOOMSCHÉ STEENWEG 444

ADMINISTRACIO  
AUG. SMIEDER 55 STRAAT 51

3<sup>a</sup> JARO

N<sup>o</sup> 12

DECEMBRO 1927

JARA ABONO  
UNU NUMERO

BELGUJO : 3.— Bfr.  
0.30 Bfr.

EKSTERLANDO 1.25 Svfr.  
0.15 Svfr.

## · Kien ni iras ?

"Kien ni iras?" — Jen la demando turmentanta nun ĉiun sinceran kaj konscian samideanon. Jam de post la mondmilito "io" inter ni komenciĝis. Konkrete embriiĝinte en la landnomaj finiĝoj ĝi ne prokrastis poste sin elapariĝi per la tuta vico de internaj aŭ sociaj malbonoj en nia mondo esperantista. Forgesiĝis la principoj de la Majstro, ĉastaj kaj saĝegaj, kaj ekmankis ĉe ni animo kaj koro. Forflugis konkordo kaj krevis nia fronto unueca. Disvagante kiel ŝafoj sen paŝtisto kelkaj el ni foriris en politikan truon malbonodorantan pro partia ŝovinismo; la aliaj mizere kaj senkonscie balbutante pri "interna ideo" kaj "ideismo" (ho vortoj, tiel nuntempe profanitaj kaj banaligitaj!) senhelpe puŝiĝas ĉiam sur la sama loko, farante nenion seriozan, praktikan, utilan. Ĉiuj ni, ĉu "kamaradoj", ĉu "burgoj", grave eraras kredigante al ni mem kaj al la aliaj ke Esperanto jam neskueble enradikiĝis en la vivon, fariĝinte sankciita, socia faktoro. Ni fermas la okulojn pri tio

ke fakte nia lingvo ankoraŭ ne eliris el la periodo propaganda kaj niaj "praktikaj" sukcesoj kaj "almilitoj" estas ankoraŭ tre malgrandaj kaj platonikaj. Ĉar pri ni oni ĝuste povas diri: "Spirito sana — korpo sana, memkompreneble la internaj nenormalaĵoj ne povis ne respeguliĝi ekstere sur la korpo, nia lingvo mem. Absorbatoj mem de niaj personaj pasioj, senmoraligante sub influoj de diversaj demagogoj kaj potencaj personoj de la mondo ekstera, ni dispolviĝas kaj, perdante nian propran fizionomion, asimiliĝas kun la publiko neesperantista en la subjektiveco kaj nigra egoismo de niaj tagoj, kvazaŭ ni ne rimarkas ke la lingvo Esperanto kaj ĝia movado proksimiĝas nun al anarkio! Ne sur la paĝoj de organoj de niaj kontraŭuloj pri tio ni legas. Nia propra nuna literaturo kaj la faktoj elvidiĝas al ni sufiĉe klare la staton nenormalan. Por nei tion oni devas esti aŭ tute blinda aŭ malsincera. Kripliĝas la bela lingvo pro ĉiam kreskanta amaso da neologismoj nebezonaĵoj kaj ofte absurdaj. Eĉ la paĝoj de niaj ĉeforganoj oficialaj kaj la ofic-

ialaj dokumentoj de I.C.K. tute ne estas lingve senriproĉaj (Vidu ekz. la protokolon pri la komunaj kunsidoj de I.C.K., K.K. kaj U.E.A. en Praha, la 16-17 aprilo 1927 kaj trouv sur pĝ. 3 kaj 7 la vortojn "permanenta" kaj speciale "eksplicite", kies signifon ĝis nun ni ne komprenas). Ĉiuj-ĉi "novaj vortoj" estas enkondukataj ŝajne senkontrolite, ĥaose, private, nuancante personan arbitron perforton, eĉ tendencojn de atenco kaj subfoso al la lingva fundamento. Flanko ĉe flanko kun la lingvo "vivisekco", la malbonstileco, pekaj kontraŭ gramatiko kaj teruraj idiotismoj, fariĝas vera epidemio kaj formas la bildon de la neklereco de la nuna esperantistaro. Kiu el la lastaperintaj literaturaroj povus vin refreŝigi per la iama stilo pura kaj agrabla? Oni ne povas esti trankvila eĉ pri nunaj lernolibroj proponante ilin al la lernantoj.

Tia stato en Esperantujo ne povas daŭrigi kaj se ĉiuj nunaj diablajoj ne estos ĝustatempe elradikigitaj, ju pli bone despli bone, ni ne povas ne timi pri nia estonto, eĉ proksima.

Por renormaligi la situacion antaŭ ĉio la starigo de forta kaj severa lingva disciplino estas necesa. Ĝi purigos nian lingvon de ĉia rubo kaj ebligas al ĝi la nenormalan sed por la lingvo artefarita iom specialan evoluon kontrolatan de kompetentularo. Nia devo komuna kaj precipe la sankta devo de tiuj kiuj nun gvidas la movadon estas rekonsciiĝi, ekvidi, ekkompreni la danĝeron nun minacantan kaj forigi la nigrajn nubojn amasiĝantajn sur nia horizonto. La resaniĝo venos nur per la honesta laborado sistema kaj praktika. Ĝi devas anstataŭi la nunan indiferentecan sintenadon kaj agadmanieron de iaj oficialaj gvidantoj, ne ĉiam konforman al la demokrataj principoj de niaj organizaĵoj, kaj ofte jen malklaran, jen eĉ infanecan. Nun, kiam oni senkompatite torturas la lingvon, la tomba silentado de la Lingva Akademio kaj Lingva Komitato ne plu povas daŭrigi. Ni scias ke la putrado de la fiŝo komenciĝas de ĝia kapo. La voĉoj de protesto de izolaj prudentuloj kaj la konsiloj "patraj" kaj "amikaj" nenion helpas. Aliaj rimedoj estaj bezonataj, radikalaj kaj

pratikaj por ekefiki sur tiuj kies koroj grasigis kaj okuloj ne vidas nek oreloj aŭdas. Dum ankoraŭ ne estas tro malfrue ni petas ke tiuj en kies manoj estas la gvidado vekigu kaj agadu senprokraste kaj energie por ke malaperu la abomena fantomo de ĥaoso jam ĉirkaŭ ni ŝvebanta.

Vo. KO.

## Ĉu ni faris nian devon ?

Malgraŭ la malfavoran atmosferon kiun "eminentaj" samideanoj provas krei ĉirkaŭ A.P.P.K., ĝi tute trankvile daŭrigas sian semantan laboron. Dum la monato septembro A.P.P.K. elspezis pli ol mil frankojn por propaganda celo. Ni deziras scii kiom Belga Ligo Esperantista aŭ iu alia enlanda grupo elspezis por sama celo por ekscii ĉu ni faras nian devon.

## Jarkunveno de A.P.P.K.

La jarkunveno de A.P.P.K. okazos jaŭdon, la 19an de januaro 1928, je la 8a vespere, en la sidejo "Centraal Schouwburg"

Laŭ art. 8a de la statutoj ĉiu aliĝinta grupo rajtas nomi tri delegitojn, el kiuj la estraro estos elektata.

La grupoj, kiuj deziras pritrakti iun punkton dum tiu ĉi kunveno, devas informi la sekretariinon pri tio antaŭ la 5a de januaro 1928.

## Je la memoro de A. Posener.

Sabaton, 31an de decembro, estos la unua datreveno de la morto de nia bedaŭrata sekretario A. Posener. Je tiu tago delegitoj iros al Holanda Putte por saluti la noblaniman samideanon en lia lasta ripozejo kaj por ornami lian tombon per floroj.

## Kiu okupas sin pri Esp. ?

Okaze de 140 jara jubileo de Esperanto estas interese scii, kiu okupas sin pri Esp. Inter la 1000 partoprenintoj el 36 landoj en la 19a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis antaŭ nelonge en Danzig, troviĝis inter alie : 5 politikistoj, 58 scienc-

uloj, 110 profesoroj, instruistoj kaj pedagogoj, centoj da statoficistoj, inter kiuj multaj oficistoj de P.T.T. kaj de l'fervojo, 23 advokatoj kaj notarioj, 33 kuracistoj, 14 pastroj, 22 redaktoroj kaj ĵurnalistoj, 64 komercistoj, industriuloj, bankieroj ktp. ktp. kaj pli ol 150 studentoj kaj lernantoj. I.E.S.

### Esp. en Radio.

En sia kunsido de l' 29 septembro 1927 en Como la Konsilantaro de la Internacia Unio de Radiofonio adoptis unuanime novan rezolucion favore al Esperanto, el kiu ni citas la ĉefan eron :

"Konsiderante, ke Esperanto estas potenca helpilo por la interkompreniĝo kaj la alproksimigo de l' nacioj, la Konsilantaro invitas denove la membrojn de la Unio dediĉi plej grandan atenton al tiu ĉi lingvo kaj antaŭ ĉio konservi ĝian instruadon en siaj programoj.

Memorigante la rezolucion de la Ĝenerala Kunsido de l' 12 majo en Lausanne, la Konsilantaro rekomendas al la membroj turni sin al la Internacia Centra Komitato de la Esperanto Movado en Ĝenevo — en kontakto kun la sekretario de la Internacia Unio de Radiofonio — kiu metis sin al la dispono de l' stacioj por indiki al ili la lokajn kunlaborantojn-esperantistojn kaj kiu estas preta ankaŭ publikigi internacian horaron de l' disaŭdigoj en Esperanto por faciligi la sukceson de la entrepreno. I.E.S.

### Prokrastitaj telegramoj en Esp.

Kiel sekvon de la allaso tutmonda de Esperanto kiel lingvo klara la P.T.T.-administracio de Danzig (IV.H./26.7.27.) decidis permesi la uzadon de Esperanto por la "prokrastitaj telegramoj". La nombro de lingvoj permesitaj estas tre limigita. Tiuj telegramoj (sole allasitaj por transmarlandoj) devas porti la indikon L.C.O. I.E.S.

### TERURA SOIFO.

LA INSTRUISTO : Kial la akvo de la riveroj kaj lagoj estas tiel malalta dum somero ?  
LA LERNANTO : Tial ke la fiŝoj tiam tiel soifas, ke ili ensorbas preskaŭ la tutan akvon.

### Grupa Vivo.

#### LA REKTO VOJO.

#### BALO

Ravita pri la sukceso de la unua balo tiun ĉi sezonon. La Rekta Vojo decidis denove organizi tre agrablan kaj intiman dancadon en la salonego St JAN, St Jansplein, 33, la 7an de Januaro 1928 (2 muzikistaroj).

Jam de nun oni povas havigi al si kartojn de la gemembroj.

La Rekta Vojo, nenion forgesos por agrabligi la dancemulojn kaj siaflanke esperas je multnombra ĉeesto.

Ĝenerala enirprezo : 3.— Fr.

#### Monata Programo de la Sabataj Kunvenoj

17 Decembro: Rememorigo de la naskiĝtago de Zamenhof. Alparolo de s-ro Jacobs. Tria legado de s-ro Karnas.

24 Decembro : Ne okazos kunveno.

31 Decembro : Ne okazos kunveno.

7 Januari : Ballo en St Jan. Kartoj estas haveblaj de la membroj.

14 Januaro : Ĝenerala, ĵara kunveno, ĉiu membro devas ĉeesti. Estrara kunveno.

21 Januaro : Amuza vespero; kruĉvort-enigmaj; ludoj; kantado.

28 Januaro : Diskutadvespero. Temo : Kio estas feliĉo.

4 Februaro : Parolado de s-ro Van Den Eynde.

11 Februaro : Parolado de f-ino Lodema; rakontoj diversaj kaj bonhumoraj.

#### ĈIUJARA, ĜENERALA KUNSIDO

La membroj kiuj havas proponojn por la venonta ĉiujara kunsido, (ankaŭ por la kunmetado de la estraro) estas petataj ĉionsendi al la sekretario f-ino B. Geers Groote Beerstraat, 7, antaŭ la 1a de Januaro 1928a.

A.P.P.K. ekscias ke la R. V. ano s-ro Karnas gvidas kurson ĉeestata de 120 da personoj en Mehleno.

**BIERVESPERO.**

Sabaton, la 26an de novembro, ni tre agrable kunfestis la duan datrevenon de la starigo de la supre nomita grupo. 50-o da ĉeestantoj prenis sur sin malplenigi baraletan da biero. Je ilia honoro ni devas konfesi ke ili plene sukcesis ĉar post unu horo la barelo estis ĝis funde malplena kaj kiom ajn s-ro Foquet klopodis kontentigi la trinkistaron per kukedojn la afero tute ne plu tiel bone funkciis ĝis kiam kelkaj bonkoruloj zorgis por la malsekaĵoj. Kantante, dancante, klaĉante kaj... trinkante, baldaŭ alvenis la fina horo.

Ni tutspeciala menscias kaj dankas per tiu ĉi voje la viglan muzikistaron, kiu certe prenis sur sin la plej gravan taskon en la bonhumorigo. JOKO

Kion devas fari ĉiu esperantisto en la venonta jaro ?

(Vidu respondon en la sekvonta bulteno).

**NEKROLOGO.**

La 19an de novembro subite mortis S-ino Nijs-Van Oeckel, patrino de F-ino I. Van Oeckel. Al la simpatia samideanino kaj al ŝia estimata familio A.P.P.K. sendas la esprimon de sia profunda kunsento en ilia granda malĝojo.

Kun bedaŭro ni eksciis la morton de la bopatro de la R. V. ano S-ro Janssens, kaj prezentas al la membro kaj familianoj sincerajn kondolencesprimojn.

**ESPERANTO INSIGNO.**

Verda stelo sur blanka rondo (17 mm.) buton-, broĉ- aŭ pendaĵformataj je 2.50 Bfr. La plej bela, la plej malkara ! Havebla ĉe ĉiuj anoj de A.P.P.K.

Centra deponejo : Kalversstraat, 12 Antwerpen.

**ILUSTRITAJ POSTKARTOJ.**

Ĉiam uzu por via korespondado la luksajn ilustritajn poŝtkartojn, eldonitajn de A.P.P.K. (Kolekto Nels).

Aperis du malsamaj serioj da 10 kartoj.

Prezo po serio : 1.50 Bfr.

Haveblaj A.P.P.K., Groote Beerstraat, 7 Antwerpen.

La teksto sur la karto estas trilingva : flandra, Esperanta, franca ; do ankaŭ uzablaj de neesperantistoj.

**RICEVITAJ PRESAĴOJ.**

Informoj de Esperanto Asocio de Estonio oktobro. — Heroldo de Esperanto, noj 41, 42, 43, 44, 45. — La Revuo Orienta, okt. — La Nova Tago, sept. — Svenska Esperanto-Tidningen (La Espero), aŭg. sept. okt. — Argentina Esperantisto, aŭgusto. sept. — Sveda Laborista Esperantisto, okt. — Oomoto Internacia, oktobro. — Le Sincériste, nov. — Arbeiter Illustrierte Zeitung (A.I.Z.) 9an de nov. — El Herald Naturista, okt. — Roia, sept. okt. — La Suda Kruco, sept. — International Language, nov. — La Verda Stelo, nov. — Amerika Esperantisto, sept. — Cosmoglotta, kaj aldono, nov. dec.

Cirkulero de la Leipzig'a Foiro. Katalogo de la verkoj de D-ro Zamenhof, eldonita de Japana Esperanto Instituto. *Fonto de Sudroj. Danco de Skeletoj. Nokto ĉe Landlimoj*, tri dramoj de Uĵaku Akita, kun permeso de la aŭtoro tradukitaj el la Japana lingvo de Hajime Ŝuzui kaj Kaname Susuki; eldonita de Japana Esperanto Instituto; prezo : 1.25 Sv. Fr.

**MONDONACOJ POR LA SUBTENADO DE LA BULTENO.**

Antaŭa listo Fr. 191.05

Por tri bultenoj	2.—
Ĉar mia "por ke..." realiĝis	3.—
Mi ankaŭ sopiras	2.—
A. A.	5.—
Je memoro	2.—

Fr. 205.05

**BELGAJ KARBOJ**

Por via vintroprovizo petu prezojn ĉe Agento de la "Belgische Kolonhandel" J. Bovoy, Minderbroedersrui 64, Antwerpeno.

Membro de A.P.P.K.